


februaro 1973

66-a jaro

n-ro 806 (2)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Kvarteto
Esperanto

Vi trovos

artikolojn el diversaj partoj de la mondo: nome, nuntempa movado en Kubo (p. 22-23), lingvistaj konferencoj en Moskvo kaj Novjorko (p. 26-27), popolaj diraĵoj de Bagdado (p. 29), spertoj en informado en Finnlando (p. 31-32) ktp. . . Ni, la redakcio, ĉiam atendas artikolojn originalecajn, pensigajn kaj utilajn el kaj por la lokaj, landaj kaj internacia movadoj, krom raportojn pri okazintaĵoj kaj okazontaĵoj. Etendante la manojn al ĉiuj anguloj de la tuta mondo, ni varme salutas vin legantojn okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (p. 25).

Enhavo

- 21 Post la Libro-Jaro (Sadler)
- 22 Fondi UN-universitatojn estas decidite
- 22 Ese-konkurso por lernantoj en Eŭropo – pri lingvo-problemo
- 22 Bona ŝanco en Kubo (Kníchal)
- 23 Nova pedagoga ekzameno
- 23 Civitanoj de pli ol 40 landoj sen traduk-problemo
- 24 Al tiu, kiu pretas servi (Starr)
- 26 Du lingvistaj konferencoj (Kulagin/Wood)
- 28 Scienca mondo: Por la Tria Laborplano; Nova kometo Heck-Sausse; Por loka movado
- 28 Nekrologoj
- 29 Popolaj diraĵoj de Bagdado (Al-Amily)
- 30 Informado sur loka nivelo (Ahomäki)
- 31 Kluba vivo: Sarpsborg
- 32 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 33 Poŝtmarka rekordo
- 34 Recenzoj
- 34 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 35 Leteroj de legantoj
- 36 TEJO-paĝo: 29a IJK en Sarajevo
- 37 Esperanto en radio
- 38 Komenco bona – ĉio bona
- 39 Oficiala informilo: n-ro 464
- 40 Kalendaro
- 40 Anoncetoj

La kovrilo

Naskiĝinta en Ĉeĥoslovakujo, la juna muzikistaro “Kvarteto Esperanto” nun komencas akiri internacian reputacion per efektiva utiligo de la Internacia Lingvo. Ne nur en sia lando sed ankaŭ en Hungarujo la kvaropo koncertis en harmonio kaj havis entute pli ol 230 prezentadojn dum la pasintaj tri jaroj. La “Kvarteto Esperanto” konscie klopodas altigi sian nivelon kaj fariĝi internaciskala en la muzika mondo...

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Redaktorino: A. Woessink-Nagata. Inkluzivas la organon de TEJO “La Juna Vivo” (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendara jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo. Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S- 692 02 Kumla 2, Svedujo. Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo. Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo. Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, Warszawa-12, Poŝkesto 100, Pollando. Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London SW19 1QX, Britujo. Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

POST LA LIBRO-JARO

La Internacia Libro-Jaro 1972 — deklarita tia de Unesko kaj apogita ankaŭ de UEA — jam eniris la historion. Kion precize ĝi celis, kaj kiaj estis la rezultoj el vidpunkto de la Esperanta libro?

Laŭ la originaj konceptoj, la Libro-Jaro celis helpi la produktadon kaj disvastigon de libroj, kiel esenca instrumento de edukado, scienco kaj kulturo, tra la tuta mondo — sed tute speciale tie, kie ĝis nun la libroj estis malfacile haveblaj. Por Unesko, tio signifis precipe en la t.n. evolu-landoj. Por Esperanto, aliflanke, ĝi signifis ne nur tiujn landojn, sed ankaŭ aliajn, kie pro unu aŭ alia kaŭzo libroj en aŭ pri la Internacia Lingvo estas malfacile akireblaj.

Por pesi, do, la rezultojn de la Jaro por la Esperanto-movado, ni ne demandu nur, ĉu aperis kaj vendiĝis pli da libroj, ol antaŭe, sed ni demandu, por kiuj ili aperis kaj kien ili disvastiĝis.

Plue kreskis la aĉetado

La nombro de libroj nove aperantaj en Esperanto dum 1972 ne estis rimarkeble pli granda, ol en la antaŭaj jaroj. Tio apenaŭ estus atendebla, ĉar la preparo-tempo necesa por eldoni libron estas pli longa, ol la daŭro de la Unesko-kampanjo. La samon oni jam konstatis ankaŭ ĉe la nacilingva eldonado. Eventuala efiko montriĝos verŝajne nur pli poste.

La aĉetado de Esperanto-libroj, aliflanke, montris en 1972 pluan kreskon de pli ol 5%, se juĝi laŭ la vendoj ĉe la Libroservo de UEA. Tiu kresko ne estas en la sama skalo kiel la kresko en 1971 sed restas tamen tre kontentiga. La sumo de la vendoj atingis preskaŭ 90 000 guldenojn.

Ĉiujare la Libroservo de UEA — sendube la plej reprezenta en la mondo — publikigas la titolojn de la plej bone vendataj libroj en ĉiu el pluraj kategorioj. Tiucele ĝi komparas la unuopajn vendojn, tiel ke la kvantaj vendoj al revendistoj ne influas la komparon. En 1972 — jam la duan jaron sinsekve — la plej ofte mendata libro ĉe UEA estis la kompilaĵo de mag. Isaj Dratwer *Pri internacia lingvo — dum jarcentoj*. En la kategorio de pri-Esperantaj verkoj neniuj aliaj proksimiĝis al ĝi.

El la belliteraturaj verkoj la plej vendata estis la n-ro 11 en la Serio Oriento-Okcidento: *Neĝa lando*, de la Nobel-premiito Kawabata — malgraŭ la fortaj kritikoj, kiujn direktis al la Esperanta eldono kelkaj recenzantoj. El la originalaj belliteraturaĵoj, aliflanke, denove venkis la novelaro de Raymond Schwartz *Vole-Novele*. Ankaŭ tiuj du verkoj apenaŭ havis konkurantojn en sia kategorio.

La popularscienca *Senĝenaj dialogoj* de Alberto Fernández same retenis sian lokon ĉe la pinto de la

nefikciaj eldonaĵoj, kvankam preskaŭ forpuŝis ĝin la ĉefa eldonaĵo *Poŝatlaso de la mondo*.

Inter ĉiuj vortaroj la plej sukcesa estis *Laŭtema vortaro* de A. Hryniewicz (Argentino), kompilaĵo kvarlingva, dum inter la lernolibroj tuj saltis al la pinto, malgraŭ la apero nur en la dua jarduono, la nova, internacie adaptebla lernolibro de William Auld *A first course in Esperanto*. La sama aŭtoro tronas jam dum pluraj jaroj preskaŭ senrivalo en la legolibra klaso per sia *Paŝoj al plena posedo*.

Laste (kvankam neniuj proklamis internacian diskojaron) ni menciuj la plej vendatajn diskojn: inter la parolaj ĉiam ankoraŭ la sama *Internacia elparolo*, kies eldonkvanto jam superis 5 000, kaj inter la muzikaj denove, post paŭzo, *La feliĉo* de Ramona van Dalsem.

Lernolibroj por la evolu-landoj

Rilate la produktadon kaj distribuon ĝenerale estas notindaj tri bonvenaj fenomenoj: lernolibroj por la evolu-landoj; eldonado en la landoj kun transpagaj problemoj; kaj represado de libroj longe elĉerpitaj. Larĝatrajte, la "evolulandoj" de la Esperanto-movado — nome tiuj, kie apenaŭ aŭ tute ne ekzistas movado — troviĝas en latinamerikaj, afrikaj kaj aziaj landoj. Kreo de nova movado en tiaj landoj dependas unuavice de la havigo de taŭgaj lernolibroj en la lingvoj hispana, franca kaj angla. Ĝuste tial estis tre salutinda en 1972 la apero de pluraj novaj hispanlingvaj kursoj el landoj sudamerikaj, de unuarangaj modernaj informiloj anglalingvaj kaj de gravaj novaj kursmaterialoj el Usono, respektive kun kasetoj kaj gramofondiskoj (precipe gravaj en landoj, kie mankas instruistoj), kaj de moderna, malmultekosta franca lernolibro de Jean Thierry, vaste distribuata en ĉiuj francalingvaj landoj.

Solvi la transpagan problemon

Pluraj el la libroj sukcese vendataj en 1972 estis eldonitaj en landoj kun transpagaj problemoj. Nur la pli ampleksa eldonado de Esperantaj libroj internacie vendeblaj el tiuj landoj povas solvi la problemon de la libro-soifaj tieaj legantoj. Ĝuste tial necesas aparte subteni la distribuon de libroj kiel *Poŝatlaso de la mondo*, *Kuŝanta tigro* (el Estonujo), *Libro de apokrifoj* (el Ĉeĥoslovakujo) kaj aliaj.

Fine, ni salutu ĉi tie la entreprenemon de pluraj eldonejoj, kiuj ekspluatas la modernajn presmetodojn por havigi al la hodiaŭaj legantoj la klasikaĵojn de la Esperanta literaturo, kiuj restis nekonataj al tro multaj en la juna generacio. Unuavice Dansk Esperanto-Forlag kun tuta serio da represoj precipe el verkoj de Stellan Engholm kaj Julio Baghy, sed ankaŭ eldonejo TK (*Viktimoj/Sur sanga tero*) kaj aliaj.

La tutjara rikolto de Esperanto-libroj eble ne estas granda laŭ la kriterioj de kelkaj naciaj lingvoj, sed, kiam oni pripensas kaj konscias la grandajn klopodojn de tiom da aŭtoroj, eldonantoj, recenzantoj, revendantoj kaj simplaj legantoj, kiuj ebligas la tutan libro-kulturon, ne eblas ne miri pri la jam granda internacia kaj interkontinenta mozaiko, kiu konsistigas tiun kulturon de la Internacia Lingvo.

V. S.



FONDI U.N.- UNIVERSITATOJN ESTAS DECIDITE

La Dua Komitato de la Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj alprenis per 86 aprobaĵoj voĉoj, 8 kontraŭaj kaj 3 sindetenaj en 1972-12-30 rezolucio, kiu postulas al la Asembleo decidi fondon de UN-universitatoj kaj de ilia fondo-komitato preparanta la tekstojn de la celo kaj ĉarto de la UN-universitato. Ĉar la Dua Komitato de la Asembleo konsistas el ĉiuj ŝtatoj-membroj, la definitiva decido en la Asembleo por la rezolucio estas jam antaŭvidebla.

Kontraste kun internaciecaj universitatoj jam ekzistantaj en pluraj landoj sub landa suvereneco, la UN-universitatoj estos sub la regado de centra oficejo tute supernacia.

Ĉu la universitatoj praktikos lingvan elitismon en la elektado de studentaro kaj instruistaro, eventuale dulingvismo? Ĉu en la ĉefaj celoj de la tuta plano — eduki homojn mondkoncepte — estos kontentige atingata per naciaj lingvoj?

Kiel ni jam delonge atentigis*, estas antaŭvideble, ke leviĝos amaso da lingvaj problemoj en la kadro de la UN-universitatoj por ilia glata funkciado, sen alprenado de la Internacia Lingvo.

* Vidu: "Esperanto", n-ro 782, p. 2-3; n-ro 804, p. 202.

ESE-KONKURSO POR LERNANTOJ EN EŬROPO

—pri lingvo-problemo

Kunlabore kun Eŭropa Komunumaro, Eŭropa Konsilantaro kaj 13 eŭropaj registaroj, la Internacia Komitato de la Eŭropa Lerneja Tago (adreso de la ĝenerala sekretario, s-ro Pierre Boudet: Rue de Bouxwiller, F-67 Strasbourg, Francujo) organizas konkursojn inter lernantoj en bazaj kaj mezaj lernejoj en la landoj de Eŭropa Komunumaro.

Unu el la konkursoj, nome por aĝo de 14 kaj 15 jaroj, enhavas temon por ese-verkado: "Ĉu la lingvo-problemo estas baro por la eŭropa unueciĝo? Kiujn solvojn vi proponas?"

La konkursoj okazas unuavice en la kadro de unuopaj landoj kun landaj premioj. El la premiitoj oni elektos iujn por pliaj internaciaj premioj, kio okazos en julio ĉi-jare.

BONA ŜANCO EN

"En Kubo ne estas multaj esperantistoj, ĉar ĝis la revolucio (t.e. en 1959) la plejparto de la kubanoj estis analfabetoj. Sed sufiĉis tri-kvar jaroj kaj la situacio tute ŝanĝiĝis, kaj ni, nur kelkaj esperantistoj, kalkulas, ke ankaŭ la Esperanto-movado elkreskos kaj ebligos al ni novajn kontaktojn".

Tiu ĉi prognozo de R. Torriente, kuba esperantisto, kiu antaŭ naŭ jaroj vizitis Ĉeĥoslovakion, komencas esti realo. La Esperanto-adeptoj sur la insulo, kie ĉirkaŭ la jarcento-ŝanĝo ekzistis dekkvino da Esperanto-grupoj, entuziasme laboras por konigi la Lingvon Internacian al siaj sampatrujanoj. En Havano lastatempe pli ol cent interesitoj reciprokis intensan perradian varbadon por Esperanto. Aŭtune malfermiĝis en la ĉefurbo Esperantaj kursoj en la Ministerio de Sukero kaj en la Instituto de Arto kaj Industrio Kinematografiaj. Ankaŭ tiamaniere manifestiĝas onia sci-avido kiu unuavide okulfrapas ĉie ĉi: en bibliotekoj kaj studĉambroj plenŝtopitaj de la lernejapartena junularo kaj studemaj laboristoj.

Du miaj amikoj el "Havana Esperanto-Rondo"² kun

NOVA PEDAGOGA EKZAMENO

La estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) komisiis prof-on d-ron I. Szerdahelyi kiel prezidanton de la ekzamena komitato de Internacia Pedagogika Ekzameno (IPE).

IPE estas institucio de ILEI, kies celoj estas:

- internacie altigi kaj unuecigi la nivelon de la lerneja instruado de Internacia Lingvo Esperanto;
- atesti surbaze de konforma ekzameno la kapablon instrui Esperanton je ĉiuj lernejoj, partopreni pedagogian didaktikan esplorklaboron kaj sciencan agadon.

La Ekzamena Komitato de ILEI (EKI) konsistas el prezidanto, sekretario kaj 30 konstantaj membroj. Ĉiu sukcesinta kandidato ricevos diplomon kaj rajtas uzi la titolon: Internacia Esperanto-Pedagogo, mallonge: dpl. IPE.

Geinstruistoj, kiuj deziras kandidatiĝi al la ekzameno aŭ nur interesiĝas pri ĝi, bonvolu turni sin al la vicprezidanto de ILEI, kiu prizorgis la kompilon de la ekzamena regularo. (Lia adreso: Helmut Sonnabend, D-3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a, F.R. Germanujo.)

Noto de la redakcio: La internacia ekzameno de ILEI estas bonvena aldonaĵo al la internacia ekzameno de UEA. La ekzameno de UEA celas diplomi instruistojn por *supera* (ekzemple universitata) instruado, dum tiu de ILEI rilatas al lerneja (do sub-universitata) nivelo.

CIVITANOJ DE PLI OL 40 LANDOJ SEN TRADUK-PROBLEMO

La monata du-lingva (angla/franca) gazeto de la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (UIA), kies membro estas ankaŭ UEA, publikigis en sia decembra numero objektivan raporton pri la 57a Universala Kongreso en Usono, inter raportoj pri aliaj kongresoj de aliaj organizaĵoj.

La en ĝi publikigita sola kongresa foto estas tiu de la UK, kun komento: "civitanoj de pli ol 40 landoj havis nenian traduk-problemon".

UIA havas proks-e 170 organizaĵojn-membrojn en kvindekda landoj, kaj ĝia celo estas ĉefe entrepreni kaj iniciati esploradon pri juraj, administraj kaj teknikaj problemoj komunaj al internaciaj organizaĵoj, publiki iliajn laborojn kaj stimuli interkontaktadon.

La gazeto *International associations/ Associations internationales* ankaŭ ĝis nun kelkfoje raportis pri agadoj de UEA.

KUBO

OLDŘICH KNÍČAL¹

admirinda inform-provizo interŝanĝis sian scion pri mia lando akiritan dank'al la leterkontaktoj tie. Kompreneble en flua senriproĉa Esperanto. Mi eksentis, kiel la mondo "malŝvelis", kiam ili montris al mi — nekredeble — faskon da numeroj de la ĉefa gazeto esperantista "Starto".


Antaŭjuĝoj rasaj kaj naciecaj estas fremdaĵo en Kubo. Kvazaŭ en kolosa fandvazo tie miksiĝis la gento diversdevena, kaj hodiaŭ altruisme-harmonie kunvivis la blankuloj, negroj kaj mulatoj. Historia tradicio montras la direkton al Hispanujo, kie sin kroĉas la ĉeno de la kultura kontinueco per la komuna lingvo.

Nature, kiel ĉiu juna, sensperta movado, ankaŭ tiu en Kubo estas serĉanta sian memon, sian propran, neripeteban vojon. La objektivaj kondiĉoj sendube favoras tiun ĉi celadon konforman al la popolamasaklerigo. Jam pro tio ĝi meritas lojalan apogon de la amikoj ĉiulandaj.

¹ La aŭtoro vizitis Kubon en 1972 kiel gasto de la enlanda ĵurnalista unuiĝo.

² Tiun ĉi nomon portas la ĵus kreita organizaĵo kontakt-ebla ĉe: Apartado 314, La Habana 1. HER estas unu el kvar-kvin similaj rondetoj en Kubo.

Antaŭ la ekspozicio en montrofenestroj de grava librovendejo en Havano viciĝis aktivuloj de Havana Esperanto-Rondo: (de maldekstre) s-roj Fernando Paredes (HER-komitatano), Oscar Otero (prezidanto), René Valdés López (vicprezidanto).




AL

MARK

Ne mankas laborejo en la mondo por amikaj kaj teknikaj manoj.

Ankaŭ en agrokulturo troviĝas sennombraj aferoj, en kiuj oni povas helpi. En Jemeno (maldekstra foto) estas dankataj la volontulaj manoj.

S-ro E. C. White en UNV



TIU , KIU PRETAS SERVI

STARR

Laŭ decido de la Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en la jaro 1970, funkcias nun la UN-Volontularo (UNV), kies sidejo estas en Ĝenevo, kiel fako de la Evoluiga Programo de UN.

Studinta la arabajn lingvon kaj kulturon en Kairo post diplomiĝo en la Universitatoj de Princeton kaj de Harvard (ambaŭ en Usono), s-ro Edward C. White respondis al miaj demandoj en intervjuo kiel homo, kiu spertis multon diversflanke.

La celo de UNV estas teknike helpi evolulandojn per la manoj de specialistoj, kiuj tie volonte servas en sia fako dum du jaroj.

Kiel nun statas la tre juna UNV? Pro nesufiĉo de mono por varbado de volontuloj kaj por vasta subtenado — s-ro White klarigis — UNV estas ankoraŭ nun tiel malgranda, ke nur 70 volontuloj deĵoras en 10 landoj. Sed UNV nuntempe varbas pliajn 110 personojn por projektoj en 30 landoj*. “Ni modeste celas havi entute 1 400 volontulojn”, diris s-ro White. UNV pagas al tia volontulo-specialisto proksimume nur 1 800 dolarojn (= 5 814 gld.) jare. La minimuma aĝo estas 21 jaroj. UNV, tute sen ia ajn politika motivo, varbas spertajn metiistojn k.s. el ĉiuj landoj. Ĉiu rekruto devas ricevi permeson de sia registaro kaj de la lando, en kiu li laboras.

“La ĉefa avantaĝo estas la ampleksa preta laborejo

inter la teknikaj fakorganizaĵoj de UN mem. Ekzemple el la unua grupo 31 volontuloj laboris kun Nutraĵa Agrokultura Organizaĵo en Ĉado, Haitio, Irano, Liberio, Togo kaj Araba Respubliko Jemeno. Kvar helpas Uneskon detrui analfabetecon en Irano.”

Bonvena — esperantisto

Al mia rekta demando “Kiel UEA-anoj kaj aliaj esperantistoj povas helpi UNV-n?”, li diris, “Se iuj havas sperton kaj profesion scipovon kaj povas sindoni dum du jaroj, ili tuj skribu al la Oficejo de UNV en Ĝenevo** precipe pri detaloj de siaj edukiteco kaj teknika kompetenteco”.

Dankante lin, mi donacis al li informilojn pri Esperanto. Espereble inter la estontaj servoj estos la “instruado de la Internacia Lingvo”, kiu certe helpus la efektiviĝon de tre signifa kunlaborado en tia kampo, kia estas UNV.

* 30 landoj: Afganistano, Araba Respubliko Jemeno, Bocvano, Burundo, Centrafrika Respubliko, Ĉado, Gambio, Gano, Haitio, Indonezio, Insularo de Cook, Irano, Jamaiko, Lesoto, Liberio, Malavio, Maŭritanio, Nepalujo, Nigerujo, Paragvajo, Peruo, Rŭando, Salvadoro, Somalujo, Sudano, Sŭazilando, Togo, Ugando, Supra Voltao, Zairo.

** La adreso de UNV: UNV, UNDP, Unuiĝintaj Nacioj, Palais des Nations, CH-1211 Ĝenevo 10, Svislando.



LINGVOSCIENCA KONFERENCO EN MOSKVO

Sub aŭspicio de Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de Soveta Unio okazis Lingvosciencia Konferenco pri interlingvistiko en Moskvo dum 4 tagoj en la pasinta oktobro.

Dum kvar tagoj sciencistoj-lingvistoj pridiskutis multflankajn aspektojn de la lingvaj problemoj kaj konsideris detalojn de la interligo de diversaj homoj, same interne de unu nacio, kiel inter diversaj nacioj. Speciale interesa estis la kunsido de la lasta tago, kiam kolektiĝis pli ol 100 personoj. La fundamentan bazan raporton faris docento M.I. Isajev (Moskvo). La raportinto tre konvinke karakterizis la perspektivan progreson de la aktualaj internaciaj interrilatoj kaj samtempe la neceson de la utiligo de la rimedoj por internacia komunikado.

Estis 7 liaj kunraportantoj.

1) S-ro S.N. Kuznecov (Moskvo) faris informon pri la problemoj de tipologia klasifiko de la lingvoprojektoj kaj detale karakterizis kelkajn tiajn projektojn, dividinte ilin inter la rangoj laŭ la nivelo de komplikeco, konstruo kaj aliaj funkciaj apartecoj. Rezulte de la komparo evidentiĝis, ke la avantaĝo estas en la flanko de Esperanto.

2) S-ro V.P. Grigorjev (Moskvo) raportis pri normaligo de la strukturo de la Internacia Lingvo Esperanto kaj tre konvinke pruvis, ke la normala evoluo de Esperanto estas nun konvena al la aktuala situacio kaj tiel klara socia fenomeno, kiel tiu de la naciaj lingvoj.

3) S-ro V.A. Vasiljev (Moskvo) parolis pri la strukturolingvaj, lernometodaj, ekonomiaj kaj sociolingvaj premisoj por apliko de la lingvo de internacia komunikado en la ĉiutaga uzado, menciante i.a. pri la neperfekteco de la maŝina tradukado.

4) Prof. D.L. Armand (Moskvo) citis multajn praktikajn ekzemplojn pri la ebleco de apliko de Esperanto kiel la lingvo en la scienca informado kaj proponis presi la resumojn de sciencaj artikoloj en Esperanto en formo de slipoj, el kiuj pli poste oni povas kompili sliparon laŭ la fakoj de scienco.

5) D-ro A.I. Vajtilavičius (Vilnius) karakterizis la vortaran enhavon de Esperanto kompare kun la vortaroj de la naciaj lingvoj. La parolanto notis, ke la ebleco de vorto-konstruado en Esperanto estas preskaŭ senlima, kio donas al ĝi avantaĝon kontraŭ la naciaj lingvoj.

6) S-ro E.A. Mozerts (Riga) parolis pri la interrilatoj de naciaj lingvoj (latva, rusa, angla) kaj Esperanto, detaligante la influon de unu lingvo al alia.

7) S-ro A.M. Lihtgejm (Moskvo) parolis pri la grafiko kaj ortografioj de la naciaj lingvoj, planlingvaj projektoj kaj Esperanto. Li tuŝis la komplikecon de la ortografioj de kelkaj naciaj lingvoj kaj la malfacilecon por posedi ilin, komparante kun la tre simpla ortografio de Esperanto.

La kunsidoj de la Lingvosciencia Konferenco havis altan sciencon nivelon kaj sendube donis tre pozitivan rezulton en la aprezo de komunikebla efektiveco de internacia komunikado en la nuna tempo per praktika utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Laŭ raporto de Teodor Kulagin



En Moskvo faris bazan raporton

M. I. ISAEV

LINGVA SEMINARIO EN NOVJORKO

La 27an de decembro 1972 en Hotelo New York Hilton, okazis grava antaŭenpaŝo en la kampo de la scienca studo de Esperanto kiel lingva kaj kultura fenomeno. Unuafoje en la 87-jara historio de la prestiĝa, 30 000-membra MLA (*Modern Language Association*, Asocio pri Modernaj Lingvoj en Usono) okazis kiel parto de la programo de la ĉiujara kunveno ankaŭ seminario sub la titolo "Esperantaj Lingvoj kaj Literaturo: Interlingvistiko".

La seminario estis organizita de la prezidanto, prof. Pierre L. Ullman (Universitato Wisconsin, Milwaukee). Lia petskribo por la aldono de Esperanta sekcio ricevis la subskribojn de 30 influaj universitataj lingvistoj en Usono kaj Kanado kaj estis akceptita de la organizantoj de la kunveno.

Inter la 50 ĉeestantoj de la ĉi-jara seminario oni rimarkis konatajn esperantistojn kiel prof. H. Tonkin (Univ. Pennsylvania), prof. E. Brent (Ontaria Instituto por Edukaj Studoj), prof. J. Lewine (Univ. Fort Lauderdale), prof. N. Süsskind (Urba Kolegio Novjorko), kaj prof. R. Aman (Univ. Wisconsin, Milwaukee).

Partoprenis la anglalingvan kunvenon kaj per subskribo petis ĝian venontjaran daŭrigon pluraj konataj neesperantistaj lingvistoj kaj verkistoj de vaste legataj verkoj pri lingvistiko. Oni menciis nur prof. Albert Valdman (Univ. Indiana), prof. Paul M. Lloyd (Univ. Pennsylvania) kaj prof. Jacob Ornstein (Univ. Texas, El Paso), kiu raportos pri la kunveno kaj plibonigos sian informon pri Esperanto en la venonta eldono de sia libro *Languages and Linguistics* (Eld. Rand McNally, Chicago). Krome ĉeestis administranto de la publikaj lernejoj de Portland, Oregon (urbo de la 57a UK), gimnaziaj kaj mezlernejaj instruistoj. Estis legitaj salutleteroj de la tre konataj lingvistoj Mario Pei (eks-profesoro Univ. Columbia) kaj Norman A. McQuown (Univ. Chicago), kiuj forte simpatias al Esperanto.

Estis prezentitaj ses referaĵoj. Sekvas mallongaj resumoj.

1) Prof. Howard P. French (Univ. Southern Illinois, Carbondale): "Esperanto kaj akademia respondeco". La ĝisnunaj bariloj kontraŭ Esperanto en la universitatoj estis ĉefe malatento kaj miskompreno flanke de la lingvistoj. Komenciĝas nova epoko. Nun urĝe necesas Usona Revuo pri Interlingvistiko (kies fondiĝo estis poste diskutita): plibonigo de bibliotekaj rime-

GVISTAJ KONFERENCOJ



Por Novjorko raportas

R. E. WOOD

doj, prefere per centra dokumentejo kiel parto de unu universitata biblioteko; nacia informprogramo, aparte emfazanta la pasintan kaj nunan favoran interon de profesiaj lingvistoj; kaj profesinivelaj artikoloj en sciencaj kaj aliaj revuoj.

2) D-ro Margaret G. Hagler (Kolegio Lincoln Land, Springfield, Illinois): "Esperanto kiel perilo de poezio". La vortfarado kaj riĉa vorttrezoro de Esperanto igas la lingvon taŭga kaj esprimriĉa perilo de originala kaj tradukita poezio. La kromsignifoj de multaj vortoj donas al la poezio freŝecon kaj nuancecon. Ekzistas tradicio pri rimoj en Esperanto; ankaŭ la radiko, ne nur la finaĵo, devas rimi. Per traduko de *The Tyger* (W. Blake) de W. Auld oni ekvidas la fidelecon de Esperanto kiel traduklingvo de poezio.

3) D-ro William A. Solzbacher (Voĉo de Ameriko, Washington): "La uzo de Esperanto ĉe internaciaj sciencaj kongresoj: Faktoj, problemoj kaj celoj." Oni distingu inter la klopodoj okazigi kongresojn, ĉe kiuj Esperanto estos la sola oficiala aŭ traduka lingvo, kaj tiuj, kie Esperanta sekcio ekzistas kune kun diversaj aliaj oficialaj lingvoj. Eble la plej esperiga laborplano nun estas organizi esperantlingvajn sekciojn ĉe internaciaj kongresoj, en kiuj la kongresanoj pritraktas sian profesion studobjekton. Jam ekzistas similaj laborrondoj en aliaj lingvoj. Oni krome rimarku la nunan priesperantan sekcion ĉe MLA, kaj similan Seminarion pri Interlingvistiko ĉe la Univ. Oslo dum 1972.

4) Prof. Richard E. Wood (Ŝtata Universitato Louisiana, Baton Rouge): "Piĝinaj kaj kreolaj lingvoj: ilia signifo por interlingvistiko." Inter la planlingvaj projektoj nur Esperanto montras strukturan similecon al tipa kreola lingvo: ambaŭkaze la provizo de bazaj radikoj estas ĉefe okcidenteŭropa, sed la gramatiko, vortfarado kaj sintakso baziĝas sur aliaj, slavaj kaj neeŭropaj, principoj. Same kiel la evoluo de piĝinaĵo al kreola lingvo, la unua lingvo de nova lingva komunumo, Esperanto en sia historio iom post iom gajnis la trajtojn de plenrajta parolata lingvo, t.e., ĝi akiris la universalajn de la homa lingvo. Oni ankaŭ povas kompari la evoluantan socion de parolantoj de Esperanto — lingva komunumo per lingvoelekto, ne per naskiĝo — al la estiĝo de nova kreola socio; kaj krome al la hebrea lingvomovado en orienta Eŭropo kaj poste en Israelo. Daŭra esploro pri la sociologio de la parolantaro de Esperanto surbaze de la grava laboro de Forster (Britujo) estos fruktodona. Entute la ekzisto de kreskanta Internacia Lingvo estas gravega sociologia kaj lingvistika fakto.

5) Prof. Julius Balbin (Kolegio Graflando Essex, Newark, New Jersey): "Ĉu Esperanto estas latinida lingvo?" Kiel diris prof. Wood, nur la bazaj vortradikoj estas ĉefe latinidaj; sed oni prijuĝas lingvon ĉefe per ĝiaj sintakso kaj vortfarado. En tio, Esperanto multe similas al finn-ugraj lingvoj. Esperanto ne estas fleksiita lingvo sen bazaj senfleksiaj formoj, kiel tipa hindeŭropa lingvo. Pluraj lingvistoj en la pasinteco, juĝante nur laŭ la ekstera aspekto de la vortoj kaj rekonante latinidajn radikojn, misjuĝis la faktojn. Esperanto montras la ĝis nun neuzitajn povojn de la homa lingvo, al kiuj aludis la granda usona lingvisto E. Sapir.

6) Prof. John F. Gadway (Univ. Southern Illinois, Carbondale): "Esperanto kaj la krizo en fremdlingva edukado." Ekzistas grava krizo en la instruado de fremdaj lingvoj en Usono. La instruado, antaŭe deviga en ĉiuj universitatoj, estas nun libervola aŭ tute neekzista. Malkreskis la intereso pri la naciaj lingvoj. Kreskis intereso pri sociologiaj studoj, ekologio ktp. Oni devas provi iel savi la studon de lingvoj. Eksperimento en la Universitato de Southern Illinois montris, ke Esperanto estas taŭga propedeŭtiko por ĝenerala lingvolernado. Ĉiuj studentoj de Esperanto-kurso tie poste esprimis deziron plue studi lingvistikon kaj komenci studi aliajn lingvojn.

* * *

Fine oni voĉdonis pri la estonteco de la seminario. La venonta kunveno de MLA okazos en Ĉikago, la 27an ĝis 30a de decembro 1973. Laŭ propono de prof. J. Ornstein, oni voĉdonis peti la Asocion organizi du apartajn seminariojn tiam. La titoloj:

Esperantaj Lingvo kaj Literaturo: Prezidos prof. Carleton W. Carroll (Univ. Wisconsin, Madison).
Interlingvistiko: Prezidos prof. Richard E. Wood (Ŝtata Univ. Louisiana, Baton Rouge).

Pro ĝenerala politiko de MLA rilate al seminarioj, kaj pro tempomanko, oni decidis peti antaŭan sendon de la referaĵoj por ambaŭ seminarioj en 1973. La respektivaj prezidontoj elektos ilin kaj dissendos ekzemplerojn al ĉiuj partoprenantoj. Ĉi-rilate prof. Wood anoncis ĝeneralan temon por la venontjara seminario pri interlingvistiko. Ĝi estas "La sociolingvistikaj kaj kulturaj konsekvencoj de la estiĝo de Internacia Lingvo."

Nova epoko en la scienca studo de la fenomeno de Internacia Lingvo jam komenciĝis.

Richard E. Wood

Por la Tria Laborplano

Mi opinias, ke Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estis ege bona kaj grava evento, kian oni devas nepre ripetadi. Tiaj aranĝaĵoj bezonas havi diversajn fakojn kaj abundan sciencajn kaj teknikajn literaturon.

Tial min ekinteresis la letero de sinjoro Rowe en la decembra *Esperanto* (p. 215) pri deponado kaj fotokopia reproduktado de manuskriptoj. Oni povus kolekti en la biblioteko Hodler ne nur ampleksajn verkojn sed ankaŭ unuopajn artikolojn. Kiam kolektiĝus sufiĉa, kontinua materialo, ĝi bone servus al diversaj sciencaj kaj teknikaj kursoj.

Laŭ mia opinio necesas tiun ĉi eron envicigi en la preparatan Trian Bazan Laborplanon de UEA.

Marie Bartovská, Ĉeĥoslovakujo

Nova kometo Heck-Sausse

André
Heck →



S-ro André Heck, astronomo en la Universitato de Lieĝo, Belgujo kaj estrarano de Internacia Scienca Asocio Esperantista, malkovris komence de 1973, kune kun alia astronomo Sausse, novan kometon. Ĝi estos konata en la astronomio kiel la kometo Heck-Sausse.

Por loka movado

En la jaro 1972, membroj de la klubo Konkordo (en Budapeŝto, Hungarujo), laborantaj en teknikaj kaj natursciencaj profesioj, kvarfoje preparolis la problemojn de la aplikado de Esperanto por sciencaj celoj.

Laŭ la opinio, elformita dum la diskutoj, la lingvo Esperanto ne okupas en la tereno de la tekniko kaj naturscienco la lokon, kiu estus en kontentiga proporcio kun la ĝenerala evoluinteco de la Esperanto-movado. Tial en ĉi tiu kampo estas necese pliigi la aktivecon de la esperantistoj.

La partoprenintoj ne konsideris necesa krei apartan organizan formon, sed decidis aranĝi ĉiujare plurajn Sciencajn Vesperojn (la unua Scienca Vesperto jam okazis en la pasinta novembro).

En la Sciencaj Vesperoj la ĉeestantaro unuavice aŭskultas fakajn prelegojn kaj diskutas pri ili, kaj rekomendas, ĉu kaj kiel la prelego aperu en la Esperanta publikaĵo.

La partoprenantoj atentigas kaj diskutas pri la eblecoj por partopreno en diversaj sciencaj aranĝaĵoj esperantistaj (someraj universitatoj ktp.) kaj eventuale iniciatas tiajn.

Ili okupiĝas regule pri la aplikado de Esperanto en la tekniko kaj naturscienco kaj faras proponojn al la landa Esperanto-asocio pri la celhavaj fareblaĵoj. Pri gravaj sciencaj verkoj esperantlingvaj ili klopodas aperigi recenzojn en la landa Esperanto-gazetaro. Kunlaborado de alilandanoj estas bonvena.

D-ro Haszpra Ottó
(Rosenberg hp. u. 5, H-1054 Budapeŝto, Hungarujo)



NEKROLOGOJ

◀ BÁLINT SZEMENYEI

Mortis en la dato 1972-12-07 d-ro Bálint Szemenyei, UEA-komitatano, delegito kaj fakdelegito pri juro, estante 66-jara. Krom kiel sekretario de la 2a Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, li aktivis ankaŭ kiel membro de la konsilantaro por Somera Esperanto-Universitato, ĉiujare okazanta en Hungarujo.

GUIDO LAZZINI (1919-1972)

Mortis je 1972-11-11 pro aŭtomobila akcidento dum sia vojaĝo en Jugoslavio komercisto Guido Lazzini, UEA-fakdelegito pri danc-muziko en Massa (Italujo), konata kiel muzikisto de orkestreto "Verda Stelo", kiu ludis en pluraj Universalaj Kongresoj.

EDUARD MACHEINER

Honora prezidanto de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, Eduard Macheiner, mortis je 1972-07-17. Li, esperantisto ekde 1924, aktivis ne nur kiel ĉefepiskopo de Salzburg (Aŭstrujo) sed ankaŭ kiel komisiito de Vatikano pri lingva ekzameno de la liturgiaj tekstoj en Esperanto. Por la 55a UK li estis membro de ĝia Honora Komitato.

POPOLAJ DIRAĴOJ DE BAGDADO

الأمثال الشعبية البغدادية

Estas konate, ke la araboj multe emas uzi maksimumojn en sia kutima parolado. La popolaj diraĵoj de Bagdado estas tre malnovaj kaj famaj aparte pro siaj spriteco, saĝeco kaj humuro. Tamen, por ke oni povu plene kompreni ilin kaj gustumi ilian belecon, oni devas scii la fonon malantaŭ ili, ĉar ili ofte baziĝas sur anekdotoj, historietoj aŭ tradicio. Tial, mi provis klarigi tiun fonon, kiam mi scias ĝin, ankaŭ la signifon aŭ la temon de la diraĵo, kiam tiuj iomete kaŝiĝas sub la bagdada stilo.

Ĉi tiujn diraĵojn mi elektis el fakaj libroj, el privataj kolektoj, de bagdadaĝ gekonatoj kaj geamikoj, el la stratoj kaj kafejoj de Bagdado, el la kamparo ĉirkaŭ Bagdado kaj ankaŭ el antikvaj libroj. Ili estas heredaĵo ne nur de la araba kulturo, sed de la kulturoj de la multaj popoloj, kiuj dum jarcentoj loĝadis en Irako kaj kies malplimultaj posteuloj ankoraŭ postvivas ĝis hodiaŭ. Mia kolekto nun konsistas el miloj da tiaj diraĵoj.

H. Al-Amily

- ♦ Demandu ĉe spertulo, ne ĉe sciulo.
- ♦ Manĝu amaraĵon, trinku amaraĵon, sed ne vivu kun amarulo.
- ♦ Tranoktu kun malĝojo, ne kun repento.
- ♦ Oni demandis al mulo: "Kiu estas via patro?" "Mia onklo estas la ĉevalo", ĝi respondis ...
- ♦ Gratu min, mi gratas vin ... (pri reciproka profito).
- ♦ La buŝo estas malgranda, sed ĝi povas detrui grandajn domojn.
- ♦ La distanco al la vero estas kvar fingroj. (t.e. inter la orelo kaj la okulo.)
- ♦ Tiun, kiun mordis la serpento, timigas la ŝnuro.
- ♦ Ĉio estas en la merkato: amo venas de supre (amo ne estas aĉetebla).
- ♦ Ne estas arbo, kiun ne skuis la ŝtormo.
- ♦ Ne ĉiu, kiu nigrigas sian vizaĝon, estas ferforĝisto.
- ♦ Ho mia mortinta sklavo! Mi nun (!) liberigas vin!
- ♦ Li fosas puton per kudrilo. (Li agas kun granda pacienco.)
- ♦ Lia tago estas monato, kaj lia monato estas epoko. (Temas pri promesinto, kiu longe prokrastemas plenumi sian promeson.)
- ♦ Tiu, kiu ne konas timon, ne povas esti kuraĝa.
- ♦ Se vi estus trista, rememoru pri via geedziĝfesto!
- ♦ En (akvo)puton, el kiu vi trinkas, ne ĵetu ŝtonojn!
- ♦ Se via amiko estas mielo, ne leku lin tute ...
- ♦ Satano neniam detruas sian domon.
- ♦ Tiu, kiu ne scipovas danci, diras, ke la planko estas malglata.
- ♦ Se la muso ebrius, ĝi promenus sur la lipharoj de la kato ...
- ♦ Ĉiu belulino havas mankon. (Neniu estas perfekta!)
- ♦ La lunon ne ĝenas la hundobojado.
- ♦ Ni kalkulas la noktojn kaj ili kalkulas nin ...
- ♦ Mallarĝa loko larĝiĝas por mil amikoj.
- ♦ Martelu akvon, ĝi restas akvo!
- ♦ Servu vin mem, anstataŭ diri al servisto: mia sinjoro!
- ♦ Mi estas emiro (princo), vi estas emiro, kiu do veturigis l'azenaron?!
- ♦ Bandomo de virinoj. (Loko, kie estas multege da babilado kaj bruo.)
- ♦ Kiam la virkoko elmetus ovon ... (t.e. tio neniam okazos!)

H. Al-Amily





La aŭtoro

JORMA AHOMÄKI

Sekretario de
Esperanto-Asocio de Finnlando

Estis interese kaj estis tre utile sekvi la artikolserion de prof. Ivo Lapenna pri informado. Tiu ĉi gravega kampo estas malfacile plugebla, sed aktiva iniciatemo povas doni relative kontentigajn rezultojn — ankaŭ sur loka nivelo. Pere de oficialaj decidoj ni ne ĉiam atingis ion menciindan en Finnlando, sed feliĉe agemaj, kompetentaj unuopuloj de tempo al tempo realigis fruktodonajn projektojn. Ni mallonge tuŝetu ilin.

Ŝlosila rolo — bonhumoro

Prelegoj en ne-esperantistaj societoj kaj asocioj montriĝis signifaj. S-ro Harri Melasniemi, FD de UEA en Turku, naĝis kiel fiŝo en maro inter membroj de rotariaj kaj leonaj kluboj. Bonhumoro havas ŝlosilan rolon en tiaj prelegoj. Jam ekde la enkondukaj vortoj oni povas facile kapti la atenton de ĉiuj aŭskultantoj, se parolanto komence salutas sian publikon en flua kaj belsona Esperanto. Almenaŭ en Finnlando estas eraro kompari Esperanton kun la angla. Se oni ion mencias pri aliaj fremdaj lingvoj, estus plej saĝe aludi ekzemple al la lingvoj hispana, araba, japana ktp. Do, paroli pri komunikiloj gravaj, sed ĝenerale malmulte scipovataj. Kio igas homojn ridi, eĉ ridegi dum prelegoj? Ekzemple anekdoto pri samlandanoj en Universalaj Kongresoj. Ankaŭ por ili la kutima demando — “El kiu lando vi venis?” — estas necesa! Mencio pri “dialekto” de komencantoj kaj imitado de tipaj eraroj ne havas negativan influon, tute kontraŭe. Preleganto devas ĉiam ion distribui al siaj aŭskultantoj: belajn vojaĝbroŝurojn en- aŭ eksterlandajn, reklamilojn de grandaj, tutmonde konataj komercaj entreprenoj. Jam dum prelego, akcentas s-ro Melasniemi, oni donu respondon al plej tipaj

demandoj, kiujn ni ĉiuj anticipu laŭ spertoj tute bone konas. Tiel demandado pri la Internacia Lingvo post prezentado povas fariĝi altkvalita kaj multflanka. Por ke publiko intense sekvu paroladon, ĝi ne estu pli longa ol 20-minuta. Multaj petoj pri similaj prezentadoj en aliaj rotariaj kaj leonaj kluboj atestas pri sukcese plenumita informa laboro.

Etaj semoj por posta rikolto

Turismaj grupetoj, en- kaj eksterlandaj, donas tre bonajn eblecojn por iu ajn en informa agado. Vizitantoj havu ĉiam kiel eble plej multajn vojaĝbroŝurojn, kiujn organizantoj de tiaj aranĝoj petu ankaŭ de tiuj urboj, kiuj ne apartenas tiun fojon al la vizitprogramo. Siajn servojn en la menciita agado proponas urbaj turismaj oficejoj.

Ni nepre uzu la koncernajn oficejojn; nur tiel oni povas vidi en la rondoj de fakuloj, ke Esperanto vivas, funkcias kaj aplikiĝas. Kiam lokaj societoj kaj unuopuloj preparas planojn por kongresvojaĝoj, ili utiligu servopretajn vojaĝagentejojn kaj antaŭ ĉio helpojn de flugkompanioj. Konata nordlanda aertrafika entrepreno SAS havigis al turkuanoj broŝurojn pri Beograd el la jugoslavia ĉefurbo en du tagoj. Bedaŭrinde vi ne povis vidi belan rideton de oficistino post perfekte kaj rapidege plenumita tasko. Precizaj adresoj de oficejoj, kiuj distribuas broŝurojn, estas esence gravaj, kaj ili devus iam kaj tiam aperi sur paĝoj de la Esperanta gazetararo, por servi ĉi tiun sulkon de la informa kampo.

Kelkfoje ni pensas, ke iuj detaloj estas tro etaj, tute sensignifaj. Kiam temas pri informaj aferoj, ni neniam



opiniu tiel. Ankaŭ malgrandaj eroj povas semi por pli posta, fruktodona rikolto. Ni donu ekzemplojn. Turista grupeto alvenas en iu haveno aŭ stacidomo, kaj tiam akceptantoj povas kaj devas per laŭtparoliloj boŭvenigi siajn gastojn kaj doni necesajn informojn. Dum urba rondveturo iu grupano perdiĝis en granda magazeno, denove laŭtparolilo estas je efika dispono. Tiel granda publiko ion ekscias pri la Internacia Lingvo. Post tia laŭtparolila informado en granda pramŝipo iu ŝipoficisto petis materialon presitan pri Esperanto kaj rekomendis ankaŭ denovan utiligon de mikrofono per la tiel bela lingvo.

Utiligi ankaŭ lokan radion

Svedaj esperantistoj vizitis Finnlandon. En iuj muzeoj oni trudis svedeparolantajn gvidantojn. Ni tamen petis gvidadon en la finna lingvo kaj uzis propran interpretiston. Kial? Svedoj ne vojaĝis en Finnlandon por aŭskulti sian propran lingvon, sed apliki kaj ekzerci Esperanton. La svedan ili povas uzi ĉiutage hejme. Tian argumentadon la menciitaj muzeaj gvidantoj komprenis. Post la prezentado kaj interpretado ili montris sian sinceran intereson koncerne la lingvon.

Multaj radiostacioj en Eŭropo havas kontrakton pri reciproka kunlaboro. Tio signifas, ke ni povas helpi ekzemple Polan Radion kaj ĉiujn aliajn staciojn elsendantajn en Esperanto. Tute simple ni rezervu tempon por surbendigo, ni kunprenu zorgeme preparitan tekston kaj eventuale iun Esperantan diskon, kaj ni voĉlegu nian programon en loka radiostudio. La kompanio pagas sendokostojn kaj respondecas pri tio, ke la de ni preparita sonbendo atingas la ĝustan celon. Kompreneble ni povas uzi niajn proprajn ma-


gnetofonojn tiucele, sed pli rekomendinde estas utiligi la studiojn de lokaj radioj. Provu iam, kaj vi surpriziĝos, kiel facile ĉio funkcias.

Por informado ni bezonas daŭre novajn ideojn. Espereble la rakontitaj modestaj eroj instigos iniciat-emajn homojn elpensi fruktodonajn, realigindajn projektojn, per kiuj ni sukcesos sciigi la t.n. grandan publikon pri la senlimaj eblecoj de Esperanto en tutmonda komunikado. Sur la informa kampo eĉ malgrandaj voĵetoj ne rajtas herbiĝi.

Jorma Ahomäki
Turku, Finnlando



**Bonhumoran
rideton
allogis s-ro
Harri
Melasniemi
(staranta)
sur la
vizaĝojn
de atente
aŭskultantaj
"leonoj"**



En la norvega urbo Sarpsborg troviĝas Esperanto-klubo, *La Urso*, kiu klopodas en ĉiuj siaj kunvenoj havi plurajn programerojn (ekzemple 1-horan instruadon, prelegeton, eĉ ŝakludon).

Ĵurnaloj en Sarpsborg lastatempe raportis, ke *La Urso* ricevos subvencion de la komunumo ekde ĉi tiu jaro. Kiel tio povis okazi?

Antaŭ du jaroj, por festi sian dudekjaran jubileon, la klubo invitis la prezidanton de la Kulturkomitato de la komunumo. Li, kiu donacis florojn al la festo, per la propraj okuloj konstatis, ke la klubo faras vere kulturan laboron. La skriba peto de la klubo al la komunumo pere de la Kulturkomitato pri mona subteno estis akceptita kun bona rezulto ...

Eble tiu ekzemplo kuraĝigos aliajn klubojn tra la mondo iniciati kontaktojn kun urbaj instancoj.

LOKE

Aŭstrujo

- En la Universitato de Vieno nun unuafoje okazas scienca kurso pri interlingvistiko. La preleganto de la kurso estas d-ro Back, anstataŭanto de la direktoro de la Instituto por Interpretistoj kaj unu el la kuratoroj de Internacia Esperanto-Muzeo Wien.

Belgujo

- La Ministerio pri Nacia Edukado kaj Nederlanda Kulturo ĵus eldonis el sia fako, Internacia Kultura Rilato, 10-paĝan artikolon pri Esperanto. La Ministerio dissendis ĝin al 400 belgaj lernejoj kaj krome al la abonantoj de *Unesco informatie*, eldonata de la sama fako. En ĝia 8a numero aperis 2-paĝa raporto pri la 57a UK en Usono. (Informis Jo Haazen.)
- Ne unuafoje, ankaŭ la pasinta-novembra demisio de la ministraro estis kaŭzita, ĉefe, de la longedaŭra lingva disputo. La ministraro ekfunkciinta en la 1972a januaro lanĉis federisman politikon bazitan sur la lingvaj regionaj blokoj kun intenco ĉesigi la jam tradician lingvan disputon, sed tio nur plie akriĝis la situacion tiel, ke eĉ la partioj reprezentitaj en la ministraro dividiĝis en lingvajn blokojn.

Ĉinujo

- Tri el grupo de cent zambiaj studentoj en Ĉina Popola Respubliko ribelis kaj estis devigataj forlasi la landon. Laŭ zambia diplomato en Pekino, unu el la kaŭzoj de ilia malkontento estis, ke ili devis fari siajn studojn pri tekniko en la ĉina lingvo, por kio ili devis unue studi tiun lingvon. Antaŭ la alveno en Ĉinujo la studentoj supozis, ke la instruado okazos en la angla lingvo (la oficiala lingvo de Zambio).

Eŭropo

- En gazetara konferenco (je 1972-11-20; pri libera migrado de laboristoj) prof-o Albert Coppé, membro de la Komisiono de Eŭropa Komunumaro, menciis i.a. la lingvajn problemojn ĝenerale kaj en la edukado por infanoj de kreskanta nombro da gastolaboristoj en la Komunumaro. Momente — laŭ lia publikigo — la nombro de migrantaj gastolaboristoj estas proks-e 3 900 000, el kiuj 1 000 000 estas el la landoj de EK mem kaj 2 900 000 el aliaj landoj.
- Al la Trilanda (limregiona) Renkontiĝo de Ĉeĥoslovakujo, Germana Demokratia Respubliko kaj Pollando, okazinta en la urbo Seifhennersdorf (GDR) en la pasinta novembro, partoprenis 123 esperantistoj. Flirtis la flagoj de la tri landoj kaj de Esperanto antaŭ la urbodomo, en kiu estis ankaŭ ekspozicio pri Esperanto kaj parolado de la urbestro.

Finnlando

- En la Somera Universitato de Jyväskylä ankaŭ ĉi-jare okazos Esperanto-kursoj de la 1a ĝis la 6a de julio por elementa, mezgrada kaj pedagogia klasoj. En la 7a tago estos ekzamenoj. Detalan informon donas la sekretario de la Somera Universitato (magistro Paavo Kuusimäki, Kesälukukauden Kanslia,

Jyväskylän Yliopisto, Seminaarinkatu 15, SF-40100 Jyväskylä 10).

Soveta Unio

- Enketo farita de individua membro de UEA montras, ke Esperanto-aktivuloj troviĝas en ĉ. 700 loĝlokoj, kaj ekzistas 54 kluboj, 117 rondetoj, 48 kursoj kaj 97 grupoj, inkluzive de 36 junularaj organizaĵoj. Lernas la lingvon nuntempe pli ol 1 500 gestudentoj en 7 universitatoj, 21 institutoj kaj 106 mezlernejoj. Tiuj sumoj estas vere minimumaj, ĉar al la enketo respondis nur ĉ. 50% de la demanditoj.

FAKE

Aeronaŭtiko

- La japana ministerio pri transporto je 1972-11-16 instrukiis al Japana Aer-Linio, kiu pasintjare havis plurajn aviadil-akcidentojn, ke JAL plialtigu i.a. la nivelon de fremd-lingva kono. La ministerio atentigis, ke ekzistas pluraj pilotoj, kiuj ne kapablas sin esprimi en la angla lingvo eĉ en ordinara konversacio, kaj ke necesas ekzerci la pilotojn en la aŭskultado de dialektecaj prononcoj de la angla, ekz-e de hindoj.

Federismo

- Grupo da eŭropanoj nun planas fondon de eŭropa federista Esperanta movado, por antaŭenigi eŭropan federacion (komence interne de EEK) kiel ekiron al la monda. La statuton k.a. oni decidis nur dum la eŭropa Esperanto-kongreso en Luksemburgo (1973a junio). La provizora sekretario estas s-ro Gaspare Bracchi, Via Caimi 54, I-23100 Sondrio, Italujo.

Fotografio

- Por la 2a tut-francuja Ekspozicio de Fota Arto okazonta en majo sub aŭspicio de la Nacia Federacio de la Fotaj Societoj oni atendas fotografaĵojn ankaŭ el eksterlando. Limdato de la sendaĵoj: 1973-03-20. Partoprenilo/regularo 5-lingva (inkluzive de Esperanto) estas petebla ĉe: s-ro Jacky Vessier, 4 rue du Fort, F-30000 Nîmes.

Muziko

- Muzika Esperanta Ligo (adreso ĉe s-ro G.B. Briano, Via C. Cabella 22/C/23, I-16122 Genova, Italujo) atendas kunlaboradon de muzikemuloj por kompili kompletan liston de Esperanto-kantoj (tradukaj kaj originalaj tekstoj kun muziknotoj).

Navigacio

- S-ro Jacek Kwiatkowski, pola eksmaristo, pasintjare faris vojaĝon tra polaj riveroj per katamarano (= speco de ŝipeto, kiu havas du flankajn boatojn aŭ flosilojn) kun esperantlingva slogan-tabulo "Pacon al niaj infanoj". Ankaŭ ĉi-jare li planas ŝipveturi laŭ enlandaj akvovojoj el Pollando tra Germana D. Respubliko kaj F.R. Germanujo al Parizo kun pola kanzonisto Czesław Niemen.

Pentrarto

- Lige kun inaŭguro de du Zamenhof-stratoj, landolima renkontiĝo kaj popola festivalo, oni organizas

R. Llech-Walter. Vidu ĉe "Persone".



SONE

en 5 francaj urboj ekspoziciojn de infan-desegnaĵoj el la tuta mondo. La temo estas Kopernik kaj ĉio, kio rilatas al astronomio; formato, minimume 21 x 27 cm; limdato, 1973-02-28. (Adreso: "Esperanto-ekspozicioj", I. Flanczynski, 29 Rue Mitry, F-62150 Houdain.)

Religio

- Oomoto kaj ĝia pacista branĉo Universala Homama Asocio organizis pasintjare Japanan Vesperon kaj kulturan ekspozicion en Parizo nur per Esperanto. La Vesperon vizitis pli ol 200 personoj.

Sporto

- La Centra Komitato de la Bulgara Asocio por Korpa Kulturo kaj Sporto lastatempe decidis, ke la bulgaraj sportistoj en internaciaj konkuradoj ne plu portu sur siaj vestoj la nomon "Bulgarija" skribitan per latinaj literoj. Ĝi devas esti skribita nur per bulgaraj literoj. (Informis: N. Nikolov, fakdelegito pri sporto.)

PERSONE

Anev

- S-ron Anani Anev, aktoron de Bulgara Esperanta Teatro, lastatempe honoris la gvidantaro de la ŝtata muzika teatro "St. Makedonski" pro lia 35-jara teatra agado.

Lebrun

- La iama sekretario de Leo Tolstoj, s-ro Victor Lebrun (vd.: Esperanto, n-ro 799-800, p. 128-130), aperis je 1973-01-10 dum 30 minutoj en la Tria Franca Televida Programo, kiun oni povas vidi en partoj de Francujo, Belgujo, Luksemburgo kaj F.R. Germanujo. Franca televida gazeto menciis ankaŭ la simpation de Lebrun por Esperanto.

Llech-Walter

- La franca "Societo por akcelo al bonfaro", prezidata de s-ro Alain Poher, prezidanto de la Franca Senato, atribuis la orarĝentan medalon al s-ro René Llech-Walter, honora prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, delegito de UEA, pro 50 jaroj da laborado por Esperanto. La ĵurnalo "L'Indépendant du Midi" favore raportis kaj fotis la dekoraciiton antaŭ Esperanta ekspozicio.

Neergaard

- D-ro P. Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, vizitis dekon da sud- kaj centramerikaj landoj en la pasinta novembro, komisiite de la Dana Registara Instituto pri Sempatologio. Urugvaja Esperanto-Societo profitis la okazon por montri la valoron de la Internacia Lingvo kaj organizis gazetaran konferencon kaj prezentadon per grava Televida Stacio en la ĉefurbo.

Schmidt

- S-ro K.O. Schmidt, F.R. Germanujo, aŭtoro de la konata Esperanta legolibro "Legu kaj ridu", ricevis antaŭ nelonge la ordenon de federacia meritkrucpro sia laboro kiel verkisto.

POŝTMARKA REKORDO



La vendado de uzitaj poŝtmarkoj por helpo al UEA atingis novan rekordon en 1972. Ĝis la 31a de decembro ĝi donis bonvenan jarenspezon de 3296,30 guldenoj: tio signifas kreskon de 10% kompare kun 1971. La poŝtmarkojn kolektis kaj donacis al la Asocio organizaĵoj, kluboj kaj unuopaj membroj tra la tuta mondo.

Multegaj membroj respondis al la anoncetoj en la revuo *Esperanto*, per kiuj ni sugestis, ke tiuj, kiuj pro iu ajn kaŭzo skribas al la Centra Oficejo, kaptu la okazon por samtempe kunsendi kun la letero kelke da uzitaj poŝtmarkoj. Tiamaniere ĉiutage kreskadis la kvanto ricevita. Multaj el tiuj, kiuj ne povas transpigi kotizon al Nederlando sed kiuj ricevadas la eldonaĵojn donace dank'al la Fondaĵo Canuto, esprimis per serioj da poŝtmarkoj sian dankon kaj sian deziron tamen kontribui al la Asocio.

Ĉiuj ricevitaj poŝtmarkoj iras — ĉu rekte, ĉu pere de la C.O. — al la komisiito s-ro Peter Zacho en Danujo. Tie okazas la purigado, ordigado kaj disvendado, ĉu kvante al komercistoj, ĉu rekte al kolektantoj, ĉu per specialaj ofertoj al filatelistoj-esperantistoj.

Kun plezuro ni esprimas ĉi tie nian koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis — tro multnombraj por unuopa mencio — sed speciale al s-ro A.H. García en Argentino, d-ro J.L. Tortel en Francujo, s-ro G. Lucchetta en Italujo, s-ino L. Dovat en Svisujo kaj s-roj A.G. Wiltshire kaj A.T. Dickie en Nov-Zelando. Modestajn premiojn ricevas ĉi-jare s-ro J. Guillaume kaj s-ino J. Oehri en Francujo, la organizaĵo Oomoto en Japanujo, s-ino E.H. Franseen kaj s-ro Haldan Agnar en Usono kaj s-ro G. Schmidt en FR Germanujo.

Plue akceptadas kun danko kaj plezuro viajn poŝtmarkojn ĉiaspecajn la komisiito de UEA s-ro Peter Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 Brh., Kopenhago, Danujo. Mendojn kaj informpetojn pri aĉeto de la poŝtmarkoj oni adresu aŭ al s-ro Zacho aŭ al la Centra Oficejo en Rotterdam.

Enkonduko al histologio

Recenzas Ralph A. Lewin (Usono):

Ĝenerala kaj homa histologio, de Wim M.A. De Smet. Liège (Belgujo): Someraj Universitataj Kursoj, 1972. 68 p. Ilus. 27 cm.

“La korpo de la homo kaj de la bestoj konsistas el pluraj strukturoj, kiuj unuavide jam montriĝas esti diversaj substancoj: ekz. ostoj, muskolo, sango, haŭto ... Tiuj substancoj estas nomataj *histoj*, laŭ la greka vorto “histos”, kiu signifas teksaĵon. La kono pri tiuj histoj estas la *histologio*.” ... Tiu ĉi lekciaro pri ĝenerala kaj homa histologio neniel estas kompleta trarigardo de la temo *histologio*. Tio cetere ne estas la celo. En unu semajno oni ne povas pritrakti tion, kio en universitatoj okupas lekciaron de unu aŭ du, aŭ eĉ tri jaroj... Sed jam superrigardo de tia amplekso, ja povas iom sufiĉi por flegistoj, por farmaciistoj, por masaĝistoj kaj kinezistoj, por sportedukistoj kaj por mezgradaj instruistoj de biologio.”

Jen enkondukaj kaj epilogaj vortoj de la verkinto; nun miaj recenzaj komentoj. Kvankam la libro ne aspektas bele, la prezento — teksto tajpita, nur dekstrapaĝe — tute bone taŭgas por la celoj indikitaj. Ĝi enhavas 8 ĉapitrojn, entute 68 paĝojn. La lingvo estas neriproĉebla, klarega, preskaŭ senerara. Do, kion mi kritiku? Unue — sed ne gravege — la titolon: prefere ĝi estus “Vertebrula kaj homa histologio”, ĉar ĝi neniom tuŝas, ekzemple, la histologion de plantoj. Due, mi bedaŭras la ne-enhavon de ia listo de ĉapitroj, indekso kaj specialista (fakera) vortaro. Supozeble De Smet, aliloke, preparas tian vortaron, nepre necesan.) Kaj trie, iom pli grave, mi kritikas la skizajn bildetojn, kiujn akompanas ne sufiĉaj klarigoj. Laiko ne eksciis, ĉu bildo montras tutan ĉelon aŭ organon, ĉu transe aŭ laŭlonge tranĉita, kaj trovas neniun indikon de grandeco.

Ekzemple, la supozeble transaj tranĉaĵoj de cilio, de aksono kaj de intesto aspektas ĉiuj proksimume samgrandaj, kvankam diametre la unua havas nur 0,5 mikrometrojn, la tria ĝis 5 centimetroj, kaj la dua...? (Kiel botanikisto, mi havas nenian ideon!)

Sed, resume, la teksto estas modela, kaj la libro, siaĉele, bonega.

Mendu ĉe UEA: 14,40 (por Nederlando 14,98) gld. plus sendokostoj 10%.

□=□=□=□=□=□=□=□=□

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

Subteninda revuo por lernantoj

Recenzas Raif Markarian (Britujo):

Juna amiko: internacia lerneja Esperanto-revuo. Red. B. Berceľ kaj G. Kurucz. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. Provnumero: 1972a novembro. 24 p. Kolore ilustrita. 19 cm.

Ĉi tiu bonege presita kaj ilustrita revuo por lernantoj 12-16-jaraj aperas kun la forta aŭspiciado de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Mi antaŭvidas, ke, kiam lernejoj instruistoj pri Esperanto vidos la gazeton, ili volonte aĉetos ĝin por revendado al la studentoj.

Ĝis nun, inter la lernejoj Esperanto-studentoj, la aĝogrupo 14-16 ĝuis nek internacian ĉiujaran kongreson (la Infana Kongreseto celas 6-13-jarulojn, kaj la TEJO-Kongreso taŭgas ĉefe por tiuj, kiuj havas pli ol 16/17 jarojn), nek presitan revuon. Ne mirinde, ke iom post iom velkis ilia intereso pri la lingvo. Venas nun “Juna Amiko” por ŝtopi unu el la supre menciitaj breĉoj de la movado. Espereble gepatroj kaj parencoj de denaskaj kaj aliaj junaj esperantistoj ankaŭ subtenos la revuon.

Gratulon al sinjoro Kurucz kaj liaj 21 kunlaborantoj el 15 landoj! La movado kaj ĝiaj junuloj meritas kaj jam delonge bezonis altkvalitan revuon. Jen ĝi estas!

Mendu ĉe UEA: Abonkotizo anoncota.



Junaj amikoj,
jen estas la
iniciatinto de
via revueto,
s-ro Géza
Kurucz.



LA

Racia kaj logika solvo

Skribas J. Brownlee (Britujo):

Unu el la multaj gazetoj, kiuj traktas aferojn de la Komuna Merkato, estas "European Community" (Eŭropa Komunumaro), kiu aperas monate en sep landoj. Mi skribis al la redaktoro en Londono por atentigi lin pri Esperanto kiel solvo por la lingva problemo, kaj li respondis, interalie: — "Mi pensas, ke la plej multaj en la komunumaj landoj malemas adopti Esperanton, parte ĉar ili ankoraŭ preferas lerni duan eŭropan lingvon.....Estas tre kurioze, sed mi opinias, ke multaj personoj ĝuas venki la malraciaĵojn kaj nelogikaĵojn de nacia lingvo."

Mi petas, ke la redakcioj en la koncernaj landoj ricevu multajn leterojn de personoj, kiuj *volas* adopti *Esperanton* kiel la plej racian kaj logikan solvon de la lingva problemo.

Jen la adresoj:

European Community, 23 Chesham Street, London SW1X 8NH	30 Jours d'Europe 61 rue des Belles Feuilles, F-75782 Paris Cedex 16
Comunità Europea, Via Poli 29, I-00187 Roma	Europäische Gemeinschaft, Zitelmannstrasse 11, D-53 Bonn
Europese Gemeenschap, Alexander Gogelweg 22, ND-Den Haag 2012	European Community, 2100 M Street N.W., Washington D C 20037 Usono

Comunidad Europea — Europäiki Koinotis — Avrupa Topluluğu,
ĉiuj ĉe:

200 rue de la Roi, B-1040 Bruxelles — Brussel.

Maristaj terminoj en recenzo

Skribas G. Waringhien (Francujo):

Legante la recenzon, kiun s-ro Kees Ruig faris en "Esperanto" (n-ro 804, p. 213) pri la libro "La sporta lingvo en Esperanto", mi trafis rimarkon pri la maristaj terminoj "slupo", "luva", "lea" kaj "ankrosokoj", kiuj "estas evidente prenitaj el PIV", kaj al kiuj la recenzinto preferas la vortojn "ŝalupo", "lofa", "mallofa" kaj "ankrobrakoj" el la "Marista Terminaro" de P. Clifford. Kiel ajn aprobinda ŝajnas la konkludo "ne blinde uzi fakterminojn el PIV" (kian homan verkon oni povas blinde uzi?), venis al mi kelkaj dubetoj pri tiuj asertoj, kaj mi kontrolis ilin en miaj ekzempleroj de la cititaj verkoj. Nu, tiam aperis, ke "slupo" (A. sloop) kaj "ŝalupo" (A. launch) ne estas unu sama boato) eĉ Clifford ilin distingas p. 21 kaj 22); ke "luvi" estas indikita en PIV kiel anstataŭigenda per "boardi", kaj ke "ankrosokoj" nenie troviĝas en PIV, sed ja en Clifford (p. 28): PIV donas por tiu parto de la ankro la pli internacian formon "spato". Restas "lea": sed se, laŭ la estimata recenzinto, "maristo preferus droni ol diri dekstre/maldekstre" anst. triborde/baborde, al kia ekstremo tiu hipoteza maristo sentus sin pelata, se li devus diri "malloflanko" anst. "leo"? Pli poste la recenzinto kritikis la uzon de "ĝiri" anst. "taki" kun jena motivo: "ĝiri estas erare uzita, ĉar ĝi signifas zigzagi": mi ne scias, de kie li prenis tiun informon, sed certe ne de la PIV, kiu donas sub "ĝiri" 3a kaj 4a tre precizan difinon, kaj referencas al la du manieroj de ĝiro per "halsi" kaj "traventiĝi". Verkon, eĉ PIV-on, estas tamen konsilinde legi, antaŭ ol kritiki.

STE APERIS ...

Curso completo de idioma internacional E. Rodriguez Ontoria. 164p. 23cm. 6,24 gld. Libroforma versio de 26-leciona koresponda kurso por hispanlingvanoj. 26 lecionoj bazitaj sur gramatikaj kategorioj. Ampleksa vortlisto kaj proverbaro. Eldonita en Argentino, 1972.

Espero, La; himno esperantista Por mezosoprano aŭ baritono. Poezio de L.L. Zamenhof. Muziko de F. de Mênil. 2p. Foto-represo. 28cm. 0,60 gld. Muziknotoj por fortepiano kaj teksto de la konata himno.

Estonio (1972) 32p. 21cm. 0,96 gld. Kolorfotoj kun klariga teksto pri la ekonomia, socia kaj kultura vivo en nuntempa Estonio.

Glumarkoj "Esperanto-Kongreso Luksemburgo — Pentekoston 1973" Nigraj literoj kaj verda stelo sur blanka fono. Folio po 10 memgluaj markoj: 0,60 gld.

Home study course in basic Esperanto; an introduction to the international "second language" of the world (1972) John L. Lewine. 131p. 28cm. Kun 14 diskoj longedaŭraj, duflankaj, monofonaj. 33 t/m., diam. 30cm. Ĉi tiu moderna usona kurso instruas la lingvon per 14 konversaciaj lecionoj en lernolibro kaj sur la samnombraj diskoj. Ĝi precipe taŭgas por memlernantoj sen instruisto, kaj la diskoj enhavas paŭzojn por respondoj. Sur la diskoj parolas angle kaj Esperante d-ro H. Tonkin, s-ino Tonkin kaj d-ro J. Pool. La kompleto en skatolo kostas 150 gld.

Junuloj en Torento (1939) Stellan Engholm (1899-1960). 144p. 20cm. 8,58 gld. Fotorepreso (1972) de la dua parto de *Infanoj en Torento*, nun sub nova titolo. La infanoj rolintaj en la unua

parto nun fariĝis junuloj kaj laboristoj kaj ekinteresiĝas pri sociaj kaj politikaj problemoj. Originala verko en Esperanto.

Kalendaro 1973 "Farbige Pflanzenwelt" 12p. 29x30cm. 2,16 gld. Belaj koloraj detalbildoj pri diversaj floroj en la naturo. Ampleksa priskribo en la germana lingvo kaj en Esperanto.

Kalendaro 1973 "Tierkalender" 12p. 42x30cm. 4,38 gld. Belaj kolorfotoj pri bestoj kaj birdoj en la naturo. Teksto en la germana lingvo. Slogano "Esperanto lingvo internacia" sur ĉiu paĝo.


Kartoj bondeziraj Kvar specoj kun nigrablankaj fotoj pri francaj temoj. Teksto en la franca lingvo kaj en Esperanto. 16cm. Ĉiu karto kun koverto po 1,44 gld.

Kit vivas Jytte Lyngbirk. El la dana tr. Gudrun Riisberg (1973). 92p. 21cm. 11,58 gld. Junulino en rondo de haŝiŝofumantoj decidas dronigi sin, sed amiko savas ŝin kaj invitas ŝin kunvojaĝi al Ameriko. Dumvojaĝe la interrilatoj ŝanĝiĝas. . .

Nederlanda bibliografio; bibliografio pri la tradukaĵoj el la nederlanda literaturo (1909-1972) P. De Smedt. 240p. 16x21cm. 10,— gld. Kun listoj ordigitaj laŭ aŭtoroj, tradukintoj, revuoj kaj ĉefvortoj de titoloj, kaj kun enhavtabelo.

Paine, La releviĝo de Tomaso R.W. Morrell. El la angla, 1972. 4p. Mimeo. 21cm. 0,30 gld. Pri brito, kiu ludis aktivan rolon en la usona milito por sendependiĝo.

Rigardu Finnlandon (1972) Ministerio de Eksterlandaj Aferoj, Helsinki. 32p. Kolorilus. 15cm. 0,36 gld. Tre plaĉaspekta informa broŝuro, unue eldonita en 1969.




TEJO

29a IJK

en

Sarajevo

TEJO-redaktoro
G. D. Winkler,
Jaegerstr. 27,
D-42-Oberhausen-
Sterkrade,
F. R. Germanujo



Se oni foje ĵetas rigardon al la historio de Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO, facile oni povas rimarki ties sufiĉe gravan evoluon dum la lastaj jaroj — kio cetere karakterizis la tutan aktivecon de TEJO. Oni iel povus diri, ke ĝis la jaro 1969 IJK-oj reflektis la ĝistiaman karakteron de TEJO, kiel de organizaĵo apenaŭ fortiĝanta administre kaj organize. La programo de TEJO-Kongresoj ĉefparte enhavis debatojn pri organiza problemaro, kio estis interesa nur al tre limigita parto de la anaro.

En 1969 tia tipe fermita aranĝo malfermiĝis al la tuta Esperanto-parolanta junularo per lanĉo de kongresa ĉeftemo pritraktinda fare de Esperanto-junularo same kiel ĝi estas pritraktata de aliaj gejunuloj. Diskutigo de la temo "junularo kaj socio" en la por TEJO iom historia sveda urbeto Tyresö praktike montris, ke problemoj de junaj homoj ĝenerale estas samtempe tiuj de la junularo parolanta la Internacian Lingvon kaj ke daŭra okupiĝo pri ĝenerale junularaj problemoj povas multe utili al TEJO mem en ĝia agado. En la postaj jaroj tuj sekvis samstilaj TEJO-Kongresoj pritraktantaj laŭvice la rilaton de junularo al lernejo, kulturo kaj la Tria Mondo. Tia tendenco malfermisian kongreson, metante en la unuan planon kongresan temon aktualan kaj interesan por ĉiu juna homo, ricevis ne nur grandan pozitivan eĥon ĉe la Esperanto-parolanta junularo, sed ankaŭ sufiĉe vigan interesiĝon de junuloj kaj junularaj organizaĵoj ne parolantaj la Internacian Lingvon.

Tamen strikta observado de la kongresa regularo ne povis transformi tian interesiĝon en praktikan kunlaboron kaj ne ebligis aŭdigon de opinioj kaj starpunktoj pri la diskutata temo en aliaj lingvoj krom la Internacia. Bezono por tiurilata daŭra malfermiĝo de Internacia Junulara Kongreso kompreneble sentiĝis.

Junularo kaj hom-medio

La sekvanta Kongreso de TEJO, kiu okazos en Sarajevo (Jugoslavio) klopodas parte efektiviĝi tiajn strebojn. Kiel sciate, la ĉefa temo de la Kongreso estas "junularo kaj hom-medio".

Por pli efike trakti la temon TEJO invitos plurajn naciajn, regionajn kaj internaciajn junularajn organizaĵojn kontribui ĉu skribe, ĉu per persona ĉeesto en la Kongreso. Uzante kompreneble Esperanton kiel laborlingvon, oni krome ebligos al ĉiu partoprenanto en oficialaj kongresaj debatoj pri la temo esprimi siajn opiniojn en nacia lingvo, kondiĉe ke li mem aŭ kun helpo de TEJO ebligu tradukadon en la laborlingvon. Ĉi tia sinteno ne nur ebligos al TEJO progresigi sian kunlaboron kun neesperantistaj organizaĵoj, sed ankaŭ donos eblecon al unuopuloj, lokaj grupoj kaj landaj sekcioj larĝigi siajn eksterajn rilatojn, kontaktante personojn, organizaĵojn kaj instituciojn, kiujn koncernas la temo, okaze de kolektado de materialo pri ĝi por prezento dum la Kongreso.

Kion fakte entenas la ĉeftemo mem?

Post apero de hom-medio kiel grava mondproblemo montriĝis ĉefe ĝiaj du aspektoj: la fizika kaj la socia. Subtemaro, laŭ kiu oni prilaboros la du aspektojn de la temo, estos baldaŭ publikigita. Koncerne la fizikan aspekton temos pri aero-malpurigo, bruoj,

akvo-malpurigo, fizika detruado kaj senprudenta ekspluatado de naturo, k.s., cetere la problemaro, sub kiu en plej multaj landoj oni komprenas hom-medion.

Sed verŝajne la Kongreso donos tute saman atenton al la socia aspekto de hom-medio, observante ke ekzemple analfabeteco, mizero, malsanoj, diskriminacioj kaj ĝenerale la pozicio de individuo en sociekonomia proceso estas ĝiaj konsistaj partoj. Kiel en antaŭaj jaroj, TEJO kompreneble ne forgesos la kongresan temon rilatigi al si mem per pristudo de ĝia lingva aspekto. Observado ankaŭ el tiu vidpunkto regule donas plian valoron al pli kompleksa pristudo de la temo, kaj aliflanke fariĝas nova kaj instrua por tiuj, kiuj ne okupiĝas pri lingvaj problemoj de la nuntempo.

La tuta kongresa programo nun projektata estos laŭeble traigita per la ĉeftema spirito. Planataj studvizitoj en malgrandaj grupoj al junaj laboristoj en fabrikoj, ekskursoj al urboj kaj regionoj karakterizaj por surloka ekzempligo de la temo, aliaj kulturaj aktivecoj kaj publikaj manifestacioj kompletigos pluraspektan studadon de la temo.

Ĉio ĉi indikas, ke la sekvanta Kongreso de TEJO donos novan dimension al la prikongresa aktiveco de ĝia membraro dum la jaro kaj al la partoprenantoj de la Kongreso ĝuindan aranĝon kun freŝa kaj moderna profilo.

S. Ĉoliĉ

SARAJEVO

Sarajevo — la geografia centro de Jugoslavio, ĉefurbo de Socialisma Respubliko Bosnio kaj Hercegovino — estos la kongresurbo de la 29a Internacia Junulara Kongreso okazonta inter 21-27 de julio 1973. Ĉar la Kongreso okazos antaŭ la 58a UK de Esperanto, okazonta en Beograd, la kongresanoj havos eblecon partopreni ankaŭ la UK-on.

Sarajevo kiel urbo plena je kontrastoj, en kiu interplektiĝas Oriento kaj Okcidento, pasinteco kun la nuntempo, prave esperigas bone vizitotan junularan kongreson.

Des pli ĉar la kongresejo estos la Domo de la Junularo, moderna konstruaĵo por ĉiaspecaj junularaj aktivecoj, kaj la kongresanoj estos loĝigataj en luksa Studenta Domo (Hotelo "Indeks"), 8-etaĝa konstruaĵo finkonstruita antaŭ unu jaro, kiu disponas pri 2-3-litaj ĉambroj.

La kongresa programo konsistos el laborkunsidoj, seminarioj, kulturamuzaj aranĝoj, renkontiĝo kun la loka junularo, studvizitoj kaj ekskursoj. La ĉeftemo diskutota dum la Kongreso estos: "junularo kaj hom-medio" (kun prelegoj, referaĵoj kaj diskutrondoj). Estas dezirinde, ke la diskutontoj jam nun preparu siajn tiurilatajn kontribuojn.

La junularaj sekcioj aliĝintaj al TEJO, junularaj grupoj kaj unuopuloj tre baldaŭ faru decidojn pri sia partopreno al la IJK kaj petu aliĝilojn de ĝia LKK*.

* Pri la adreso de la LKK kaj la kongreskotizoj ktp. oni vidu: "Esperanto", n-ro 805, p. 12.

ESPERANTO EN RADIO



Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran numeron.

SKIZO DE LA KONSTANTA PROGRAMO DE POLA RADIO

1) Posttagmeza elsendo de 15.30 ĝis 16.00 h.: *dimanĉe*, "Panoramo de internaciaj eventoj" prezentas mondajn eventojn laŭ la pola vidpunkto kaj "Esperanto-Ekspreso", sonrevuo pri la tutmonda esperantista movado; *lunde*, "Koncerto kun bondeziroj", senpaga servo por aŭskultantoj, kiuj deziras sendi salutvortojn ornamatajn de kanzonoj al aliaj esperantistoj; *marde*, "Pri kio oni parolas en Pollando?", rubriko pri polaj aktualaĵoj, kaj "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio"; *merkrede*, "Anguleto de nevidantoj", junulara magazino "Kune", filmmagazino, "Aŭskultantoj petas, ni disaŭdigas" (sinsekve ĉiun merkredon); *ĵaŭde*, "Leterkesto", citado kaj komentario de leteroj de aŭskultantoj, konstanta konkurso pri la plej interesaj leteroj; *vendrede*, "Literatura aŭ kultura programo", portretoj de polaj verkistoj kun fragmentoj de iliaj verkoj, intervjuoj kun literaturistoj, kritikistoj; *sabate*, "La semajno en Pollando", sonrevuo de la plej gravaj kaj interesaj okazintaĵoj en la lando prezentitaj per mallongaj scenetoj interplektitaj kun muzikaj interludoj.

2) Matena elsendo de 5.00 ĝis 5.30 h.; ripeto de la programo dissendita la antaŭan tagon posttagmeze; krome, en ambaŭ elsendoj, novaĵoj, komentarioj aŭ felietonoj pri aktualaj polaj kaj internaciaj temoj.

3) Programfolio publikigata dufoje en la jaro kaj anoncoj pri konkursoj estas sendataj senpage al ĉiu petanto; skribu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtokesto 46, Warszawa, Pollando. La ĉefaj premioj de ĉiu konkurso estas 10-tagaj ekskursoj tra Pollando.

4) La ondlongoj uzataj de la stacio estas listigitaj en la tabelo de la januara numero de la revuo; pri la matena elsendo, bonvolu legi 41.27 m (7270 kcs) anstataŭ 41.18 m (7285 kcs).

KOREKTO

S-ro N.Z. Maimon, aŭtoro de la artikolo "Bjalistoko" aperinta en la decembra Esperanto, skribis jene en sia letero de 1972-12-27:

La detalo koncerne al la naskodomo de Zamenhof estis bazita sur malnoviĝinta informo. La domo ne plu ekzistas pro decido de la urbestro en 1958, kaj tie nun staras 5-etaĝa konstruaĵo ekde tiu jaro. En 1959 oni metis al ĝia muro blankamarmoran tabulon kun enskribo (pola kaj Esperanta): "Ĉi tie staris domo, en kiu en la 15a de decembro 1859 naskiĝis la kreinto de Internacia Lingvo Esperanto, d-ro Ludoviko Zamenhof".

EL LA DEK DEVOJ DE LA ESPERANTISTO

8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa; "senlace" varbu por UEA.

Estas esperantistoj, kiuj pretendas, ke Esperanto vivas kaj vivos nur per sia literaturo. Tio estas danĝera kaj *kontestebla aksiomo*. Ĉar ankoraŭ hodiaŭ ekzistas riĉa literaturo, verkita en la klasika greka kaj en la latina lingvoj, kvankam ambaŭ lingvoj ne plu estas uzataj en la fakta senco de la vorto. Esperanto havas ŝancon esti plene akceptita kiel internacia lingvo (apud la gepatra lingvo) NUR se ĝi sukcesos enpenetri en ĉiujn sferojn kaj mediojn de la internacia homa socio. Tion atingi estas unu el la ĉefaj celoj de via internacia organizaĵo UEA.

Sed, UEA estas "tegmenta organizaĵo". Ĝi ne kapablas realigi siajn celojn sen la helpo de fortikaj naciaj organizaĵoj, la tiel nomataj "Landaj Asocioj". Ilia tasko estas *disvastigi* la lingvon kaj informi pri ĝi, sur landa nivelo, en plej *celtrafa* kaj plej *celkonscia* maniero. UEA estas gvidata de Komitato. La Landaj Asocioj — kondiĉe ke ili havu minimume 150 membrojn — elektas sia(j)n reprezentanto(j)n en la Komitato de UEA. Tiuj elektitoj nomiĝas Komitatanoj A. Por certigi, ke UEA funkcii kiel eble plej efike, estas nepre necese, ke la Landaj Asocioj zorgeme elektu siajn kandidatojn por la Komitato. Nur la plej kapablaj, la plej laboremaj kaj la plej bone informitaj personoj kapablas gvidi la Asocion kaj realigi ĝiajn celojn. Pri la celoj de UEA la statuto diras:

- disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;
- plifaciligi la *ĉiuspecajn* spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo.

Klarigoj:

sen-lac-e: adverbo, kunmetita el la du vortoj "sen" kaj "laco"; sen laciĝi, nelacigeble (similaj formoj: senkore, senforte, senakcente, senglore, senpere = sen interveno de iu/io)

kontest-ebl-a: kontesti = sincere dubi pri la ĝusteco aŭ la vereco de iu afero aŭ diritaĵo. Afero aŭ aserto, pri kiu la opinioj estas malsamaj (diverĝaj), estas "kontestebla afero". Mi forte dubas, ĉu li estas fidinda. = Mi trovas lian fideindecon tre kontestebla.

aksiom-o: diraĵo, kiun oni ĝenerale rigardas kiel evidentan, de ĉiuj akceptitan.

tegment-a (organizaĵo): tie ĉi la vorto "tegmenta" estas metafore (t.e. vortfigure) uzita. UEA estas organizaĵo, sub kies "tegmento" kolektiĝas la Landaj Asocioj. Ĝi estas kvazaŭ kupolo super la L.A., kiuj aliĝis al ĝi.

dis-vast-ig-i: fari, agi, aktivigi, por ke io (la lingvo Esperanto) estu vaste aplikata kaj penetru en ĉiujn direktojn (dise). (komparu ankaŭ: diskonigi, disfamigi, disaŭdigi, diserigi, dismembrigi ktp.) Ĉiuj tiuj ekzemploj de verboj havas aktivan sence (estas transitivaj). Ilia pasiva formo (ne-transitiva) finiĝas je "iĝi" (disfamigi).

cel-traf-a/cel-konsci-a: trafanta la celon, konscia pri la celo. Tio, kion vi faras, ne estas tre celtrafa = La ŝanco, ke vi,

per via laboro, trafos la celon, estas tre malgranda (Vi ne laboras celtrafe). Li havas klaran scion pri la celo de sia laboro = Lia laboro estas celkonsciata — li laboras cel-konscie.

ĉiu-spec-a: = de ĉiuj specoj = ĉia(j). Ĉiuspecaj rilatoj = de ĉiuj specoj = ĉiaj rilatoj (ĉiaspeca estas pli-malpli pleonasma). Atentu, ke en tiaj kunmetaĵoj oni ellasas la pluralan "j" de la unua vorto. Vi do ne diru: ĉiuj-specaj rilatoj. Same oni diras: ne sentojriĉa (riĉa en sentoj) sed sentoriĉa, ne arbarojplena (plena de arbaroj) sed arbaroriĉa (regiono).

IOM PRI LA VORTORDO EN ESPERANTO

Sub "vortordo" ni komprenas la sinsekvon de la diversaj elementoj, el kiuj konsistas frazo.

La lernolibroj diras ĝenerale, ke en Esperanto la la vortordo estas libera. Estas vere, ke ne ekzistas severaj kaj specialaj reguloj, laŭ kiuj oni devas konstrui frazon.

Tamen, por eviti miskomprenojn estas necese meti unu apud la alia tiujn elementojn de la frazo, kiuj rekte rilatas unu al la alia. Se, ekzemple, via frato donis al sia amiko pomon, kiu jam estis putrinta, vi diru: Li donis al sia amiko pomon, kiu estis putrinta. La subfrazo (kiu estis putrinta) rilatas rekte al la lasta vorto de la ĉefa frazo (pomon). Tiu lasta vorto, al kiu referencas la adjektiva subpropozicio, nomiĝas "rilativo". Se vi malobservus tiun regulon, dirante: Li donis pomon al sia amiko, kiu estis putrinta, vi fakte diras, ke NE la pomo, sed la amiko estis putrinta, kaj tion mi ne kuraĝas supozi.

Alia ekzemplo: Li metis la manon en la mantelpoŝon de sia fianĉino, kiu estis pendigita sur la hoko. Oni parolas, evidente, en la subfrazo pri la mantelo kaj ne pri la fianĉino. Sekve oni devas konstrui la frazon tiel, ke la lasta vorto de la ĉefa frazo (rilativo) estas la mantelo. Se tio iel ne eblas, necesas ripeti, per alia frazkonstruo, la vorton, al kiu rilatas la adjektiva subfrazo (Li metis la manon en la mantelpoŝon de sia fianĉino, KIES MANTELO estis pendigita sur hoko).

Ankaŭ simplajn adjektojn de tempo, loko aŭ cirkonstanco oni zorge metu en la ĝustan lokon. Jen kelkaj amuzaj ekzemploj de vortorde miskonstruitaj frazoj: Li legis, ke oni sukcesis kapti la sovaĝan tigron en ĵurnalo (anstataŭ: Li legis EN ĴURNALO, ke oni kaptis la tigron).

Li riproĉis al sia edzino, ke ŝi sekse ne kontentigis lin en ĉeesto de atestantoj (anstataŭ: En ĉeesto de atestantoj li riproĉis al sia edzino, ke ŝi sekse ne kontentigis lin).

Se vi, kara leganto aŭ legantino, NE TUTE komprenis mian babiladon pri la vortordo en Esperanto, mi rekomendas, ke vi regule legu bone redaktitajn revuojn kaj senriproĉe verkitajn librojn. Sed, se vi TUTE NE komprenis miajn eksplikojn, mi devas konstati, ke mi mizere malsukcesis.

MEMBRO-STATISTIKO 1972

Jen la stato de la membraro je la fino de decembro 1972 kaj por kompari ankaŭ kun tiu je la fino de decembro 1971.

	1971	1972
Asociaj membroj:	24 555	25 591
Individuaj membroj:		
MJ	804	727
MA	4 715	4 837
MS	246	274
DM, D. Pat.	843	886
HM, H. Prez.	19	18
J-MJ	68	40
J-MA	147	159
MA-K	157	110
	<u>6 999</u>	<u>7 051</u>
Membroj entute:	31 554	32 642
Simplaj abonoj:	<u>102</u>	<u>141</u>
Pagintoj entute:	31 656	32 783

ŜANĜO EN LA ESTRARO DE UEA

Per sia letero de la 23a de decembro 1972 s-ro E.L.M. Wensing eksiĝis el sia funkcio de vicprezidanto de UEA kaj el la Estraro, sed li plu restas komitatano C. La prezidanto informis pri tio la Komitaton per sia cirkulera letero 6/73 de la 12a de januaro.

NEDERLANDA IMPOSTO ŜANĜITA

Niaj membroj loĝantaj en Nederlando bonvolu noti, ke la impostotarifoj 14%, pagenda je la prezoj de diskoj, insignoj, glumarkoj k.s. aĉetataj ĉe UEA, estas ŝanĝita ekde la 1a de januaro 1973 al 16%. La imposto je libroj kaj broŝuroj restas la sama, kiel ĝis nun, nome 4%.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Butter, H. M., Amsterdam, Nederlando.
Hubers van Assenraad, R.W.J., Den Haag, Nederlando.
Johansson, Stig, Tomelilla, Svedujo.
Magnusson, Inga, Hälsingborg, Svedujo.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

20 E. Svane, 21 J. Verstraeten, Belgujo. 22 L.F. Robinson, Britujo. 23 E.J. Frost, 24 B. Kallehave, 25 T. Kehlet, 26 J. Pedersen, 27 I. Schleicher, 28 S. Ziegler, Danujo. 29 A. Korpela, 30 L. Vuolo, Finnlando. 31 R. Bernard, 32 Y. Nicaise, Francujo. 33 W. Heinrich, 34 L. Jolliet, FR Germanujo. 35 M.A. Clark, 36 A.L. Maier-Bevel, Kanado. 37 W.B.P. Blomme, 38 A. Breddels, 39 G. de Jong, 40 J.L. Mast, 41 D.M. Ponti, 42 A.W. Treurniet, Nederlando. 43 J.T. Allan, Nov-Zelando. 44 A.R. Correia, Portugalujo.

45 P. Aimen, 46 S.H. Carlsson, 47 B. Fingalsson, 48 Y. Forslund, 49 S. Kinnander, 50 K.J. Moberg, 51 S. Möllestad, 52 G. Nordström, Svedujo. 53 H. De Sassi, 54 H.W. Grossmann, 55 L. Grutter, 56 F. Wetler, Svisujo. 57 M. Perray, Tajlando.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-04-15 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Arnold J. Baldwin, D Melbourne. **Brazilo:** Gersi A. Bays, FD Chapecó; Flávio Gouvêa, D kaj FD Presidente Prudente; Alberto Flores, D Volta Redonda. **Finnlando:** Eero Laitinen, D Heinola. **Francujo:** Alain Chalm, FD Le Havre; Robert Llorens, FD Nice; Jacques Seurin, FD-Pau; André Fabre, FD Pau. **Jugoslavio:** Milivoje Veličković, FD Niš. **Nederlando:** Adriano Breddels, D Den Haag; Truus van Woerden van der Graaf, FD Den Haag; Aloysius Bloemhard, FD Den Haag. **Svedujo:** Ingvar Lagerström, FD Göteborg. **Usono:** Gary E. Moore, D kaj FD Bethany; Dorothy Holland, D Santa Barbara; Roy Holland, VD Santa Barbara.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1972, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Brazilo: Volta Redonda (D). **Britujo:** Birmingham (VD kaj FD Quayle). **Finnlando:** Heinola (VD). **Francujo:** Dijon (FD Lepinte), Montelimar, Sceaux. **Hispanujo:** Zaragoza (FD turismo). **Hungarujo:** Oros-háza.

DONACIOJ 1972 (Gld.)

Asocia kapitalo: Nederlando: H. Veenstra, 1 000,—. Sumo ĝisnuna: 1 000,—.

Asocia kapitalo: Nederlando: H. Veenstra, 1 000,—. **Fondaĵo Canuto:** Finnlando: I. Helsingius, 26,50. Nederlando: R. Moerbeek, 25,—. Svedujo: P. Almen, 28,59; ges-roj Luin, 28,60; S. Möllestad, 16,63. Sumo ĝisnuna: 2 579,60.

Ĝenerala kaso: F.R. Germanujo: W. Barnickel, 2,65. Kanado: f-ino B. Salt, 400,—. Nederlando: f-ino E.H.C.H. Veen, 500,—; H. Veenstra, 500,—. Svedujo: G. Anderson, 39,90. Svislando: s-ino L. Matthey-Claudet, 2,50. Usono: memore al Clarkson Crane, 80,70. Anonimaj donacoj, 8,24. Sumo ĝisnuna: 3 000,92.

Propaganda konto: F.R. Germanujo: F. Lowitzer, 5,—. Nederlando: H. Veenstra, 1 000,—. Sumo ĝisnuna: 1 580.

Revuo "Esperanto": Kanado: f-ino B. Salt, 500,—. Sumo ĝisnuna: 500,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
Universala Esperanto-Asocio

KALENDARO

Februaro — Septembro

Februaro

17-24 E-skisemajno (LES), Werfenweng-Salzburg, Aŭstrujo

19-25 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

10 Esp-ista renk. dum la foiro, Leipzig, GDR

16-17 Ĝen. kunveno de Svisa E-Societo, Gwatt

31 Limdato de la belartaj konkursoj

31 Kotizoj de Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

6-8 Skota E-kongreso, Hamilton, Britujo

11-18 Studsemajno, Grésillon, Francujo

14 Zamenhof mortis en 1917

18-25 Kultursemajno-junularrenkontiĝo, Grésillon

29-1/5 11a Markola kongreso, Folkestone, Britujo

30 Limdato de Internacia Ekzameno

Majo

12-13 4a kultura semajnfino, Renens, Svislando

12-18 25a kongreso de IFEF, Aarhus, Danlando

19-20 3a amik.-kongreso, Grésillon

Junio

2-3 Norvega E-kongreso, Haugesund

3-13 Skolta kunveno, Bregenz, Aŭstrujo

9-11 Eŭropa Esperanto-kongreso, Luksemburgo

9-11 Jarkongreso de sveda E-federacio, Kalmar

20 Limdato por aliĝo al Universala Kongreso
29-30 5a Franca-Hispana E-renk., Bilbao, Hispan.

Julio

1-7 Somera universitato, Jyväskylä, Finnlando

1-14 Internaciaj E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo

1-22 Kulturaj E-semajnoj, Grésillon, Francujo

5-22 Pedagogia E-seminario, Primošten, Jugosla.

16-29 Internaciaj E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo

18-27 6a IREN-renkont., Abaliget, Hungarujo

21-27 Konf. de ILEI, Maribor, Jugoslavio

21-28 29a Int. Junulara Kong., Sarajevo, Jugosl.

22-29 Inter. feriaj kursoj, Helsingør, Danlando

22-5/8 Internaciaj semajnoj, Grésillon, Francujo

24-28 41a Kongreso de LIBE, Beograd, Jugosl.

24-27 Antaŭkongreso, Ljubljana, Jugoslavio

28-4/8 Int. infana kongreseto, Beograd, Jugosl.

28-4/8 58a Universala Kongreso, Beograd, Jugosl.

30-5/8 46a Kongreso de SAT, Toronto, Kanado

Aŭgusto

1-14 Intern. E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo

5-12 Oficiala Postkongreso, Ateno, Grekujo

5-12 19a Int. E-feriosemajno, Krommenie/Assendelft, Nederlando

5-15 Int. turista renkontiĝo, Szeged, Hungarujo

5-26 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo

15-18 Int. turista postkongreso, Esztergom, Hung.

16-29 Int. E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo

26-9/9 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo

Septembro

2-8 Eŭropa ferio-semajno, Fürigen, Svislando

29-30 5a Kultura semajnfino, Renens, Svislando

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (t.e. 1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anonc(et)oj respondecas sole nur la anoncantoj.



Tutmondaj infanoj: La Urbeŝtaro kaj Centro de Esperanto Santa Coloma de Gramanet invitas vin partopreni la Duan Internacian Ekspozicion-Konkurson de pentraĵoj. La temo estas libera kaj laŭ akvarela sistemo. Aĝo de 6 ĝis 14 jaroj. Minimuma grandeco de la verkoj, 25 x 35 centimetroj. Limdato la 10a de aprilo 1973. Sendoj al Ayuntamiento de Santa Coloma de Gramanet — Ponencia de Cultura — Santa Coloma de Gramanet (Barcelona) — Hispanujo.

◀ **Marko Aureljo**, brazila, kvarjara, deziras korespondi kun samaĝaj, pri infanaĵoj. Araxá 40 Apt. 202, Grajaú ZC 11, 20.000 Rio, Guanabara, Brazilo.

Tento ne estas peko — diras nia senpaga verketo "La provo de fido". Petu ĉe Esperanto-Misio, Box 7, Östansjö, S-694 02 Hallsberg 2, Svedujo.

Spacpoŝtmarkoj, ludkartaroj dezirataj. Kion vi deziras interŝanĝe? Sune Ahlm, Sandbergsväg 14, S-460 60 Vargön, Svedujo.

Junaj (kaj ne nur junaj) volas korespondi kun vi pri ĉio. Ĉu vi volas entuziasmigi ilin? Bv. skribi al la peranto: Josef Vítek, Box 25, 276 80 Mělník 1, Ĉeĥoslovakujo.

Facile atingebla de Eŭropo estas la apudmara, sudangluja feriejo Hastings, Sussex, kie en bona, komforta gastdomo "Croft House", The Croft, esperantistoj ĉiujare libertempas.

La princo de nia poezio. Frandu lian belon kaj esprimpovon per La Kremo de Kalocsay, 69 poemoj el 12 libroj. £0,40 aŭ egalvaloro, ĉe Libroservo de UEA, aŭ rekte de D. Soen, 40 Long Acre Road, Bristol BS14 0HW, Anglujo.

Esperanto-Klubo de Kuopio, PL 119, SF-70101 Kuopio 10, Finnlando, bonvenigas kontribuantojn por letervespero; bv. aldoni numeralojn 1-10 en via nacia lingvo. Inter ĉiuj respondintoj estas lotumitaj 10 tipe finnaj belaj premioj. Limdato 28.2.1973.

La Eta Princo de Saint-Exupéry estas ĉarma 102-paĝa ilustrita libro "por infanoj", verdire kun *altnivela filozofio!* Mendu ĝin ĉe la tradukinto: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source. Prezo: 28 fr. fr., afrankite.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK 5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

La dolĉa Francando estu en ĉiu esperantista biblioteko! Romantika, riĉa kaj ĉarma 128-paĝa luksa libro kun 69 ilustraĵoj. Broŝurita: 28 fr. fr. afr. aŭ: 38 fr. fr., bindita. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, B.P. 901, F-45010 Orléans, Francujo. Poŝta ĝirkonto: 271-69 La Source.

Jus aperis

Al Torento, originala romano de Stellan Engholm, 96 pĝ. 3'a eldono. Torento estas la nomo de vilaĝo sveda. Tien iras juna terlaboristo por trovi laboron kaj kontakti pli vastan mondon. Li renkontas i.a. f-inon Enjo... 12,— dkr. aŭ 5,46 guld.

Infanoj en Torento, originala romano de St. Engholm. 100 pĝ. Du knabetoj kaj du knabinoj renkontiĝas en sablejo por ludi. Unu el la knaboj havas "diablan" patrinon, la alia drinkeman patron. La du knabinoj estas fratinoj, sed ne havas patron. Jen la komenco de problemoj kaj konfliktoj en la vivo. 15,— dkr. aŭ 6,42 guld.

Junuloj en Torento, 2'a parto de Infanoj en Torento. St. Engholm, 144 pĝ. La infanoj fariĝis gejunuloj, kiuj klopodas trovi laboron, sed en Torento regas granda senlaboreco. La gejunula rondo lertigas sin en vesperaj kursoj kaj ĝuas kamaradecan vivon per diskutoj kaj migradoj. 20,— dkr. aŭ 8,58 guld.

Kit Vivas, romano tradukita el la dana lingvo, 96 pĝ. La 17-jara Kit venis en rondon de narkotistoj. Ŝi ne sukcesas liberiĝi el ĝi. Fine ŝi decidas dronigi sin. Ken, 18-jara junulo, hazarde preterpasas kaj savas ŝin... Eksterordinare interesa libro. 27,— dkr. aŭ 11,58 guld.

Ĉi tiuj libroj estas haveblaj ĉe UEA aŭ ĉe ĉiuj aliaj libro-servoj aŭ ĉe la eldonejo:

DANSK ESPERANTO-FORLAG
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

LA GRAMOFONDISKO kun 4 himnoj el Adoru Kantante, kantataj de Margit Håkansson-Frisell, estas havebla ĉe Förlag Gröna Stjärnan, S:t Pauligatan 6, 1 tr, S-416 60 Göteborg, Svedujo. (Obs. la novan adreson!) Prezo: Sv.Kr. 12—, inkl. sendokostojn.



ESPERANTO

GLUSTELO

Gluebla sur
aŭtomobiloj ktp.
Formato: 12 x 9 cm.
Prezo: nur 0,90 gld.

Mendu ĉe Libroservo de UEA

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos denove en 1973 (22. — 29. de julio) en La internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj pasigi neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Programo estas senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
Dk-8230 Åbyhøj, Danlando.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"
faka kunlaboranta asocio de UEA

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)

FELIĈA JARO = AGRABLAJ FERIOJ

El la Kulturaj Aranĝoj 1973 en

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo Grésillon

F-49150 BAUGE, Francujo

Elektu:

Dum la Paskaj Ferioj:

4/11 - 18 **STUDSEMAJNO:**
Kursoj, Konversacioj, Prelegoj
4/18 - 25 **KULTURA SEMAJNO:**
organizata de JEFO sub la aŭspicioj de UFE.
Programo preparita de la junuloj laŭ la temo
"KUNVIVADO". Kursoj, Paroladoj, Distraĵoj.

Dum la Somero:

7/1 - 22 **KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ:**
Kursoj, Preparado al ekzamenoj, Konversacioj,
Distraĵoj, Korbifarado, Librobindado, Emajlado.


Dum tiu periodo, samtempe:

7/1 - 8 Fervojista Semajno
7/8 - 22 Dusemajna seminario por la Esperanto-Komisiono de "Ecole Moderne" (Moderna Lernejo)

7/22 - 8/5 **INTERNACIAJ SEMAJNOJ:**
Prelegoj, Konversacioj, Ekskursoj, Distraĵoj

8/5 - 26 **STUDSEMAJNOJ:**
Diversnivela Kursoj, Preparado al ekzamenoj,
Aktivaĵoj (Librobindado ktp...), Konversacioj,
Distraĵoj

8/26 - 9/9 **STUDSEMAJNOJ:**
Kursoj, Konversacioj, Ekskursoj, Distraĵoj



IDEALA KOMBINO

En la Domo de UEA en Rotterdam troviĝas la biblioteko Hodler – unu el la 3 plej grandaj Esperanto-bibliotekoj de la mondo, kun multaj raraj libroj, periodaĵoj kaj manuskriptoj.

En tiu sama Domo de UEA troviĝas ekde aŭgusto 1972 unuaranga moderna fotokopia aŭtomato, la plej nova kserografia modelo Rank-Xerox 4000. Senfine konserveblaj, klaregaj kopioj sur ambaŭ flankoj de ordinara papero! Granda rapideco: ĝis 45 kopiojn en minuto!

Tiu ideala kombino signifas, ke de nun la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler estas tuj disponebla al kolektantoj, literaturamantoj, esperantologoj k.a. en la tuta mondo.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? praverkon el la 19a jarcento? la plej unuan numeron de Esperanto? elĉerpitan poemaron? Zamenhof-manuskriptojn?

Prezo de unu kopio (formato A4): 0,30 gld. Ekzemplo: kompleta kopio de 200-paĝa libro en kutima formato kostas nur 30,— gld. plus sendokostoj.

FOTOKOPIA SERVO DE UEA

El Popola Ĉinio

**Esperanta Monata Ilustrita
Specimeno akirebla senpage**

ABONTARIFO: 1 jaro £0,50 Kan.\$2,00 5,— gld.
2 jaroj £0,75 Kan.\$3,00 7,50 gld.
3 jaroj £1,00 Kan.\$4,00 10,— gld.

ABONU: Ĉe niaj perantoj en diversaj landoj
aŭ rekte ĉe la Libro servo de Ĉina Esperanto-
Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



En la suda parto de Balkano, por vi kaj viaj infanoj laboras granda ligno-industria fabriko "Crn Bor" (Nigra Pino) de Prilep (Makedonio, Jugoslavio), kiu ĉiujare partoprenas en internaciaj foiroj por mebloj en Parizo, Kolonjo, Moskvo kaj Lajpcigo.